

中國報通

EL POPOLA

1

1990

ĈINIO



NOVJARA

Ĉe la sojlo de la nova jaro ni kore salutas niajn karajn legantojn kaj perantojn, kiuj longtempe laboris por distribui "El Popola Ĉinio".

Ĉi-jare estas la 40-a datreveno de la fondiĝo de EPC. En la pasintaj 40 jaroj, kiel fenestro por koni Ĉinion kaj ponto por profundigi amikecon, EPC estis vaste bonvenigata de diverslandaj samideanoj, kiuj nomis ĝin "nia revuo". Guste sian sinceran amikecon miloj kaj dekmiloj da legantoj verŝis sur ĝin, ke ĝi fariĝis prospera kaj plena de viveco. Por celebri nian komunan feston, ni petis kaj petas kontribuojn de niaj legantoj por la rubriko "Mi kaj Ĉinio". En la 5-a numero de 1990 ni publikigos memorigajn artikolojn kaj bildojn. Ni sincere esperas, ke niaj amikoj verkos por nia revuo.

Ĉiu progreso de EPC estas nedisigebla de la zorgado de niaj legantoj. En tiu ĉi-numero ili certe rimarkos la novajn rubrikojn, kiujn ni malfermis laŭ ilia peto. "Nia Mondo" prezentos pejzaĝojn kaj morojn de diversaj landoj. "Amuzoj" konigos la ĉinan ŝakon tre popularan en Ĉinio kaj prezentos humuraĵojn,

Laborantoj de la redakcio de EPC salutas la legantojn



SALUTO

ludojn kaj konkursojn. "Poemo ● Kaligrafiaĵo ● Pentraĵo" ĝuigos ĉinan antikvan poemon kaj, per ĉinstila pentraĵo apude, komprenigos ĝin kaj tiel pli bone konigos la ĉinan antikvan kulturon. "Scenejo kaj Ekrano" aperos en ĉiu dua numero kaj prezentos novajn ĉinajn filmojn kaj teatraĵojn. Artikoloj pri ĉinaj antikvaj filozofoj, interesantaj niajn legantojn, aperos en rubriko en la dua duonjaro.

La nunaj ĉinaj aferoj estas ĉiam atentataj de niaj legantoj. Ni ĝustatempe raportos pri okazaĵoj en diversaj lokoj de Ĉinio. Baldaŭ ni publikigos serion da artikoloj de niaj raportistoj pri la ĉarma kaj riĉa delto de Perlo-rivero en suda Ĉinio.

"Libera Forumo de Eminentaj E-istoj", "Fotoj Faritaj de E-istoj" kaj artikoloj traktantaj Esperanton trovis ŝaton de niaj legantoj. Ni daŭre kontribuos por akceli la disvolviĝon de E-movado kaj esperas pluan kunlaboron de diverslandaj samideanoj.

La Red:





INTER NI

Mi skribas al vi tre malfrue, sed tio permesis al mi legi ankoraŭ la numeron 7, en kiu mi legis la rubrikon "Inter ni", kie vi eldonis mian antaŭan leteron pri propraj nomoj, do mi dankas vin multe, kaj feliĉe mi vidis, ke vi transskribas nun la ĉinajn proprajn nomojn en ambaŭ manieroj: hanlingva fonetika alfabeto (pinyin) kaj tuj apude la Esperanta prononco.

B. RENÉ (Francio)

Se eble, mi ŝatus legi informojn pri la lingvoj de Ĉinio, inkluzive de la regionoj kie ili estas uzataj, la nombro de personoj kiuj parolas ktp.

B. A. DE FIGVEIREDO
(Brazilo)

Mi tre interesigas pri la disvolviĝo de la ĉinaj scienco kaj tekniko, sociaj aferoj, vivo de la popolo, naturo, naturprotektado kaj batalo kontraŭ poluciado de la vivmedio, des pli pro tio, ke en via landego loĝas pli ol kvinono de la tutmonda loĝantaro.

B. RU (Nederlando)

Laŭ mi al la gazeto mankas humura paĝo de krucvortenigoj, per kiu vi povus organizi konkurson por la legantoj kaj premii partoprenantojn per libroj aŭ filatelaĵoj.

B. DOLENEC (Jugoslavio)

Vi skribas nenion pri la orientaj religioj kaj filozofio. Mi pensas, ke la orienta filozofio estas tre interesa kaj ĝi vekos la interesigon de legantoj.

M. DRWAL (Pollando)

Mi pensas, ke estus bone enkonduki artikolojn pri alilandaj regionoj, kiuj povus ĝemeliĝi kun ĉinaj regionoj, kaj enkonduki artikolojn pri importeksportaj entreprenoj.

PÉREZ ÓVILO (Hispanio)

Mi ŝatus pli da artikoloj por komencantoj.


H. WINDISCH
(FR Germanio)

ENHAVO

- 7 **Fruktodona festivalo en Pekino**
- 12 **Batalo de Ĉinio kontraŭ pornografia polucio**
- 39 ĈINA LITERATURO:
Feng Menglong, Ling Mengchu kaj prospero de noveloj en Ming-dinastio
Perfidita prostituitino Du Shiniang kaj ŝia trezorujo
- 20 **Viglas la tuta urbo**
- 44 "Varma Tero" por investantoj
- 14 Zhao Youfeng kaj ŝia japana trejnisto
- 34 INTERVJUOJ:
La unua virino en la "morta zono"
- 52 LA IMPERIESTRĀ PALACO (7):
Malkvieta Qianqing-palaco
- 16 Al nia rond' vi ĉiam mankos!... (Poemo)
- 23 Kvar sistemoj de la ĉinaj pladoj
- 18 AMUZOJ:
Ĉina ŝako (I)
- 47 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (8):
Ĉe Jinsha-rivero
- 43 POR KOMENCANTOJ:
Plej bona kuracilo por la kronprinco
- 31 SUR NIA LIBROBRETO:
Libro pri historio de Ĉinio
- 27 POEMO ● KALIGRAFAĴO ● PENTRAĴO:
Pri la poemo "Al Yuan'er, kiu veturas komisiite al Anxi"
- 6 Omaĝe al la 40-jara jubileo de EPĈ
- 2 Novjara saluto
- 30 POR VIA SANO:
Korposanigaj metodoj (XI)
- 32 NIA MONDO:
La Karnavalo de londonaj nigruloj
- 17 ESP-NOVAĴOJ
4 INTER NI
- 37 KURANTAJ AFEROJ
- 19 KORESPONDI DEZIRAS
- SUR LA KOVRILO:
Knabinoj ĉe ruino
- Foto de HAI FENG
- 4 Montvilaĝo
- Foto de HUANG LUKUI
- SUR LA DORSKOVRILO:
[ĈINAJ POŝTMARKOJ]
Palacaj kaj festaj lanternoj

LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tianjin
2. Jinan
3. Kantono
4. Hainan-provinco
5. Chengdu
6. Chongqing
7. Nankino
8. Yangzhou



卅語通聲氣
 友誼遍天涯
 和平昭萬古
 四海成一家
 中國報導創刊
 四十周年紀念
 楚圖南

Omaĝe al la 40-jara jubileo de EPC

de CHU TUNAN*

*Esperanto semas amikecon
 En la monda esperantistaro.
 Granda paco benos l' estontecon
 Kaj familtiĝos la homaro.*

* La aŭtoro, 90-jara, funkcias kiel prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto".



Ujgura teler-danco

Fruktodona festivalo en Pekino

Teksto de WEI RAN

Fotoj de HAI FENG

ESTIS ebriga vespero de la 15-a de septembro, 1989. En la impona Popola Halo de Pekino leviĝis la kurteno por la Dua Ĉina Arta Festivalo, kiu koincidis kun

la 40-a datreveno de la naskiĝo de la nova Ĉinio. Ĝin ĉeestis multaj alilandanoj.

Dum la tri-semajna festivalo aktoroj prezentis 180-foje pli ol 60

programojn en Pekino. La spektatoroj de Pekino havis la ŝancon ĝui diversstilajn kaj enhavoriĉajn prezentojn.

La ĉinaj operoj estas kristaloj de

la saĝo kaj arta kreivo de la ĉina nacio kaj famas tra la mondo per sia ĉarmo.

En tiu ĉi festivalo oni prezentis pekinan operon, Kunshan-operon, pingĝu-operon, Henan-operon, Hebei-operon, Shaanxi-operon, Yangzhou-operon, Sichuan-operon kaj aliajn. La nove kreita historia dramo "Cao Cao kaj Yang Xiu" prezentita de la Ŝanhaja Pekin-opera Teatro havis apartan ĉarmon, tradician kaj ne tute tradician, pro la arta strukturo kaj bela prezentado.


Modernaj dramoj luditaj en la festivalo kvankam ne multaj, estis tamen interesaj. Estas multe pensiga "La unua domo sub la ĉielo" prezentita de la Pekina Popola Arta Teatro. Ĝi priskribas la prosperon kaj malprosperon de restoracio por montri la ŝanĝigon de la homa socio.

La prezentado de ĉinaj baletistoj premiitaj en internaciaj konkursoj estis bonvena al la spektatoroj. La lerta tekniko kaj ĉarmaj dancoj forte manifestis la disvolviĝon kaj atingojn de baletoj, kiu enkondukigis en Ĉinion en 1954.

De 1980, ĉinaj baletistoj de la tria generacio prezentis multfoje internacie. Ili gajnis sume 45 premiojn en konkursoj okazintaj en Sovetunio, Japanio, Usono kaj aliaj landoj. Oni diris, ke tio estas ofero de la baletistoj al la festivalo.

En la festivalo la ĉinaj spektatoroj havis la ŝancon ĝui prezentadon de artistoj el Sovetunio, Koreio, Italio kaj aliaj landoj. Post 30 jaroj ili denove havis la ŝancon ĝui la tradician arton de la baleta trupo de la Ŝtata Akademia Granda Teatro de Sovetunio kaj belegan prezentadon de la junaj sovetiaj artistoj en la moderna baletoj "Spartako" kaj aliaj klasikaj dramoj. La teknikoj de la junaj steloj kaj la grandampleksaj dancoj mirigis la ĉinajn spektatorojn.

En la festivalo, sur la scenejo de Pekino aperis nova programero




La danco "Pan Jinlian"

Sceno el la dramo "La Unua Domo sub la Ĉielo"

Foto de YANG LIMING





Sceno el la baleto "Lanhuahua"



Simfonia ludo en la inaŭguro

“Orienta Irizo”, kiu prezentas vestojn de la 55 ĉinaj nacimalplimultoj. Pli ol 20 naciminoritataj aktoroj prezentis ĉ. 1 000 brilajn kaj originalajn vestojn kun ornamaĵoj. La prezentado, kvankam sen intri-

goj, trovis ŝaton de la spektatoroj.

Krome, en la festivalo estis okazigitaj ankaŭ du ekspozicioj de belartaĵoj kaj gaja surplaca dancoprezentado. La festivalo havis siajn

branĉojn en dek du provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kie ĝuiĝis diversaj prezentoj plenaj de lokaj gustoj. La tuta lando estis en granda gajeco dum la festivalo.

Sceno el la pekina opero “S-ino Gantang”

Foto de YU XIANGJUN





La danco "Belaj Knabinoj kaj Gajaj Knaboj"

Sceno el "Orienta Irizo"



Akrobataĵo: Ekvilibro de stako da bovjoj sur la kapo



Batalo de Ĉinio kontraŭ pornografia polucio

de CHEN BAOHE

GRANDSKALA “flavaj-balao” movado disvolviĝas inter 1.1 miliardoj da ĉinoj.

En Ĉinio oni riproĉas pornografiajn kiel “flavajn objektojn” kaj pornografiajn librojn, gazetojn kaj videobendojn kiel “flavajn librojn, gazetojn kaj videobendojn”. Tial, oni nomis la laboron reordigi la kulturen merkaton komencitan en julio 1989 “flavaj-balao”.

REAPERO DE PORNOGRAFIAĴOJ

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la prostituo kaj pornografiaĵoj estis radikale atakitaj

Likvido de pornografiaj videobendoj



kaj forigitaj. En la postaj 30 jaroj malofte vidiĝis pornografiaĵoj en Ĉinio.

En la fino de la sepdekaj jaroj, Ĉinio komencis senprecedencan socian reformon, kio ne nur revivigis la ĉinan ekonomion, sed ankaŭ prosperigis la literaturon kaj arton de Ĉinio kaj riĉigis la kulturen vivon de la popolo.

Samtempe kun tio, pornografiaj legaĵoj kaj videobendoj kaŝe enfluis en Ĉinion. En iuj regionoj de Ĉinio ekaperis subteraj klikoj kompilantaj, presantaj kaj kopiantaj pornografiaĵojn. Utiligante laŭleĝajn kontraŭleĝajn rimedojn, iuj privataj librokomercistoj eldonis kaj vendis pornografiajn librojn kaj gazetojn. Kun ekonomia konsidero eĉ iuj ŝtataj eldonejoj komencis eldoni “debitajn librojn”, kiujn ili ne devis eldoni.

En iuj librejoj, precipe sur strataj librostandoj aperis pli kaj pli multaj pornografiaj noveloj, romanoj, bildolibroj kaj gazetoj, enhance malriĉaj kaj fikciaj. Iuj eldonaĵoj simple per nomo malkaŝe paradisian pornografian enhavon por logi legantojn. Aliaj eldonaĵoj senŝirme vidiĝis pornografian aŭ obscenan faron sur la kovrilo. Iuj privataj kaj eĉ ŝtataj videoprezentejoj en iuj regionoj kaŝe aŭ malkaŝe projekciis pornografiajn videobendojn, kies plejparto estis kontraŭbandita en ĉinajn marbordajn regionojn kaj poste transportita al aliaj lokoj. Kompreneble tio estis nur unu el la kaŭzoj de pornografia polucio.

SERIOZA SEKVO

La ĉiam pli serioza pornografia polucio kaŭzis ĝeneralan maltrankvilon en la socio.

Artikolo de s-ino Wu Xiuping (U Ŝiŭping), laborantino de la Propaganda Departemento de la Pekina Virina Federacio, publikigita en la Pekina Tagjurnalo (*Beijing Ribao*) prezentis maltrankvilon kaj ĉagrenon de la popolamasoj pri la inundo de pornografiaĵoj. Ŝi diras: “Vizaĝe al la inundo de la ‘flavaj libroj’ kaj ilia influo al infanoj, la gepatroj estas tre maltrankvilaj kaj malpaciencaj. La infanoj estas niaj gefiloj kaj la espero de la patrolando. Sed antaŭ ol ili maturiĝos, ili estas korodataj de ‘flavaj eldonaĵoj’”. Dum laboro ni estas maltrankvilaj, ke la infanoj vizitas tiajn librostandojn. Hejmenreveninte ni ĉiam

demandas ilin, kiujn lokojn ili vizitis.” La verkinto citis diron de maljuna laboristo: “La kovrilojn de multaj libroj vendataj sur strataj librostandoj eĉ preterpasantoj hontas rigardi. Tia faro celanta profiton sen konsidero pri sana kresko de la infanoj simple estas murdo pro mono.”

Fakte, la inundo de pornografiaĵoj ne nur serioze influis sanan disvolviĝon de la ĉina socio, sed ankaŭ rekte damaĝis la koron kaj korpon de la infanoj.

Laŭ statistiko de la Chaoyang-distrikta Lernejo de Deliktaj Geknaboj de Pekino, 60% el ĝiaj lernantoj kaj 95% el ĝiaj lernantinoj faris seksan eraron.

Krome, laŭ statistiko de la Pekina Edukejo de Krimaj Geknaboj, de 1982 senĉese leviĝas la elcento de geknaboj pro seksaj pekado kaj krimado. Tiujare ilia elcento estis 10% de la edukitoj, en 1987 tiu cifero atingis 41.2%. En 1982 la meznombra aĝo de sekse pekintaj geknaboj estis 15.5 jaroj kaj en 1987 14.8 jaroj. En analizo de seksaj kulpo kaj krimo de la geknaboj, la menciitaj lernejo kaj edukejo opinias, ke 70% el la geknaboj vojeraris pro la tento de pornografiaĵaj eldonaĵoj kaj videobendoj.

REFOJA BATALO KONTRAŬ PORNOGRAFIA POLUCIO

En la pasintaj multaj jaroj la ĉina registaro senĉese faris batalon por forigi la pornografian polucion. Sed la laboro ne akiris idealan efikon pro malfortaj rimedoj kaj malakorda kunlaboro de la socio. Eĉ vidiĝis tia fenomeno: Nur kelkajn monatojn aŭ eĉ kelkajn semajnojn post ĉiufoja malpermeso revidiĝis “flavaĵ eldonaĵoj” sur strataj librostandoj.

En la tria tagdeko de junio 1989, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro decidis fari refojan batalon kontraŭ la pornografia polucio. Senprecedenca movado por malpermesi pornografiajn objektojn disvolviĝis en la tuta lando.

Zhejiang estis unu el la provincoj serioze inunditaj de “flavaĵ eldonaĵoj”, tial oni pli frue komencis la “flavaĵ-balaan” laboron. Post la 10-a de julio 1989, kiam la registaro de Zhejiang-provinco okazigis kunvenon por reordigi la provincan kulturan merkaton, oni tuj komencis samtempe vastan kontrolon en 90% de la gubernioj kaj urboj de la provinco. Dank’ al laboro de 15 058 homfojoj, oni konfiskis pli ol 65 000 ekzemplerojn de 150 pornografiaĵaj kaj kontraŭleĝaj eldonaĵoj, 412 443 lascivajn afiŝbildojn kaj frostigis 60 000 ekzemplerojn de 298 libroj, kun enhavo de perforto, teruro, superstiĉo k.a., reordigis 1 794 librostandojn kaj 1 066 vendejojn kaj projekciojn de videobendoj.

Ankaŭ Henan-provinco pli frue ekpaŝis por malpermeso. En la 18-a de julio 1989, oni samtempe



Librostando post likvido de pornografiaĵaj verkoj

komencis vastan kontrolon en la tuta provinco, 779 kontrolaj grupoj kun 6 550 personoj kontrolis 4 041 stratajn librostandojn kaj 341 presejojn. En la postaj dek tagoj, la provinco konfiskis kaj frostigis 1 310 000 ekzemplerojn de pli ol 600 pornografiaĵaj kaj kontraŭleĝaj eldonaĵoj.

La ĉifoj movado ne nur mobilizis la forton de la socitavoloj, sed ankaŭ emfaze kontrolis la originajn lokojn, nome severe ataki la kontrabandan aktivadon kaj kontraŭleĝan agon de eldonejoj, komplete forigi subterajn presejojn kaj vendejojn. En la meza tagdeko de septembro 1989, Li Ruihuan, konstanta komitatano de la Politika Buroo de CK de KPĈ, venis al la suda urbo Kantono por direkti la “flavaĵ-balaan” laboron kaj okazigis tie la “flavaĵ-balaan” kunvenon de la provincoj Guangdong, Fujian, Zhejiang kaj Hainan. Ĉar ili estas marbordaj provincoj, tial ili fariĝis kontrabandaj lokoj de pornografiaĵoj kaj estis ĉefaj lokoj kontrolataj en la “flavaĵ-balaan” movado.

Laŭ statistiko de la Ŝtata Novaĵa kaj Eldona Administracio de Ĉinio, en la unua monato de la “flavaĵ-balaan” laboro, oni kontrolis en la tuta lando 40 000 distribuejojn de eldonaĵoj, malpermesis 2 300 librovendejojn sen komerca akto, punis 2 000 kontraŭleĝajn distribuejojn je provizora vendo-ĉesigo por reordigo kaj konfiskis 11.34 milionojn da ekzempleroj de libroj kaj gazetoj kun pornografia, superstiĉa kaj perforta enhavo. Iuj pekintoj estis leĝe punitaj.

La “flavaĵ-balaan” movado en Ĉinio jam akiris certan sukceson kaj disvolviĝas pli profunde kaj pli vaste. La centra kaj lokaj registaroj emfazis, ke en la “flavaĵ-balaan” laboro oni devas pli prosperigi la literaturon kaj arton kaj vigligi la kulturan vivon de la popolamasoj. Tial, la kulturaj organizaĵoj, literaturaj kaj artaj laborantoj de la diversaj lokoj klopode laboras en la “flavaĵ-balaan” movado por prospero de la literaturo, arto kaj kultura vivo de Ĉinio.



Zhao Youfeng konkuras en Japanio.

TIAN YUBAO:

Zhao Youfeng kaj ŝia japana trejnisto

PRI maratono oni scias nur, ke ĝi signifas vetkuron de la distanco de 42 km kaj 195 m, kaj malklare, kiom da penado devas fari sportisto kaj trejnisto por ĝi. Nun mi rakontu al vi kelkajn anekdotojn pri ĉinaj sportistinoj kaj ilia japana trejnisto.

KIEL SAMFAMILIANOJ

La 12-an de novembro 1986 Zhao Youfeng (Ĝaŭ Joŭfeng) kaj ŝia kolegino Chen Qingmei (Ĉen Ĉingmei) flugis al Japanio kaj farigis trejnatoj de s-ro Nobuya Takeuchi, profesoro de la atletika fiziologio de la Aiĉi-a Eduka Instituto kaj ekstrejnistoj de la japana maratona teamo, kaj komencis ekzerci sin per maratono.

Tuj enirinte la domon de s-ro Takeuchi, Zhao demandis lin: "Kiel mi nomu vin?" Li respondis serene: "Nomu min paĉjo kaj mian edzinon panjo, se preferu." La ges-roj loĝigis ilin ĉe si kaj ekhavis

ankaŭ du ĉinajn filinojn, krom la siaj du.

Kiel aliaj japanaj viroj, s-ro Takeuchi ne faras domlaborojn. Ilin plenumas ekskluzive lia edzino. Sed post kiam Zhao Youfeng kaj Chen Qingmei ekloĝis ĉe ili, li ofte vizitis memservejon por fari aĉetojn.

Prof. Takeuchi laboras ankaŭ kiel estro de la elementa lernejo sub la eduka instituto. Ekvidinte lin en la memservejo, nemalmultaj mire demandis lin: "S-ro, kial vi mem aĉetas legomojn?" Li ridetis: "Ĉe mi loĝas du ĉinaj sportistinoj. Por ke ili havu bonan nutron, mi devas mem elekti por ili legomojn kaj aliajn mangaĵojn." Tiucele li pretigis recepton pri mangaĵoj kaj preparis por ili nutroriĉajn kaj bongustajn pladojn.

PATRINA KORO

Aprile de 1989, post kiam Zhao Youfeng gajnis la ĉampionecon de

la Internacia Virina Maratona Konkurso okazinta en Nagojo, Japanio, reprezentanto de la Tokai-a Disaŭdiga kaj Televida Kompanio de Japanio venis speciale al la hejmo de s-ro Takeuchi kaj prezentis flor-korbon al lia edzino kaj adresis al ŝi salutvortojn:

"Kiel japana virino, vi faris grandan penadon por kulturi du ĉinajn sportistinojn. Pro tio ni esprimas al vi estimon."

Ankaŭ lia edzino bone zorgis pri ili. Por vivi kaj sin trejni en Japanio, la ĉinaj knabinoj devis unue venki la lingvan malfacilon. La edzino de s-ro Takeuchi volonte prenis sur sin la instruadon de la japana lingvo. Ŝi aĉetis por ili japanlingvaj lernolibrojn kaj kajarojn kaj instruis al ili, kiel prononci kaj skribi kanaojn. Ŝi postulis, ke ĉiutage ili skribu 5 paĝojn da hejmtasko malgraŭ sia okupiteco kaj laco. Ĉiuvespere, farinte la dommastrumadon, ŝi sidis super korektado de ilia hejmtasko. Lerni ĉinajn ideogramojn en la japana

skribolingvo estis plej malfacile por Zhao Youfeng. Ili en malsamaj skriboformoj estas malsamsencaj. Komprenible, por noti ilin en la memoro oni devas pene lerni. La sinjorino pacience klarigis la sencon al la knabinoj. Dank' al ŝia pli-ol-dujara instruado, la japanlingva nivelo de la du knabinoj rimarkinde altiĝis. Nun ili povas flue paroli japane.

La edzino de s-ro Takeuchi bone zorgis pri la vivo de la ĉinaj sportistinoj. Foje Zhao Youfeng suferis de piedkalo, kiu tre dolorigis ŝin dum ŝia trejniĝo. Tion rimarkinte, la sinjorino tuj aĉetis unĝventon kaj propramane ŝmiris ĝin sur ŝian plandon. Alifoje en trejniĝo Zhao Youfeng senatente vundis al si genuon, kiu ŝveliĝis kaj kongestiĝis. La sinjorino tre maltrankviliĝis pro tio, tuj veturigis ŝin al hospitalo kaj telefone revokis hejmen sian edzon, kiu estis donanta lekcion. Zhao Youfeng diris al ŝi: "Panjo, mi ne grave vundiĝis. Ne ĝenu vin multe!" "Ne diru tion. Vi venis de malproksime. Kiel via japana patrino, mi devas porti plenan respondecon por via sanstato, alie mi vanigos la esperon de viaj gepatroj."

DEZIRO REALIGATA IOM POST IOM

Levinte la dekstran manon, Zhao Youfeng juris nome de ĉiulandaj sportistoj: "Ni certe faros ĉiajn penojn por fini la kuradon kun dezirata sukceso."

Ŝi estis la ĉampionino de la Nagoya Virina Maratona Konkurso en 1988. Kutime, ŝi devis esti sportistino n-ro 1 en la kurantjara konkurso. Tial ŝi faris la juron nome de ĉiuj sportistoj. Tio ĝojigis s-ron Takeuchi. Kun granda espero por la ĉinaj sportistinoj li diris: "Ili estu senrivalaj tiurilate en la mondo."

La vortoj havas duoblan sencon: Unue, li deziris, ke Zhao Youfeng kaj Chen Qingmei senĉese progresu en maratono kaj gajnu la mondĉampionecon iam estonte; kaj due,

li kulturos ilin en altkvalitajn homojn fortajn en la mondo.

Por realigi sian deziron, li faris multon. Li havas plurajn sociajn oficojn kaj krome donas lekcion en postlaboraj horoj kaj invitive servas kiel juĝisto por konkursoj. Li neniam ripozas dimanĉe.

Malgraŭ tio li verŝis sufiĉe da energio sur kulturadon de la ĉinaj knabinoj. Ne povante ĉiutage gvidi la trejnadon, li ellaboris detalan planon rilate enhavon, kampon, distancon kaj atentigojn de trejniĝo de lundo ĝis sabato. Li postulis, ke ili bone plenumu la planon. Ĉiutage, kiam li hejmenrevenis laca, li unue aŭskultis ilian raporton pri trejniĝo kaj poste diris al ili, kion ili faru en la sekva tago.

Li ne krude donis konsilojn, sed laŭ trajtoj de maratono komprenigis ilin en ilia trejniĝo. La plej fundamentaj faktoroj de maratono estas rapideco, persisteco, kapablo variigi rapidecon kaj akordiĝo de movoj. Por ke la ĉinaj knabinoj akiru pli da spertoj en praktiko, li postulis, ke ili atingu "liberecon" en trejniĝo kaj komprenu tiujn faktorojn en kurado. Zhao Youfeng diris: "Mi alkitimiĝis al tia trejnado. Mem percepti teknikajn ŝanĝiĝojn estas multe pli bone ol kompreni ilin sub alies instrukcio."

La trejnejo, aranĝita de s-ro Takeuchi, estas distingiĝa. Zhao Youfeng kaj Chen Qingmei trejnitis sin ĉiam sur herbejo. Lunde ili trejnitis sin sur herbejo de golfoklubo 3 km for de lia hejmo, marde sur gazono de parko kaj merkrede sur gazono apud ŝoseo. Li diris, ke tia medio estas akirita pro limigo de kondiĉoj. Li bone konis, ke sur herbejo mola longdistanca kuristo ricevas preforton al la piedoj malpli grandan ol tiun sur ŝoseo aŭ alispeca kampo, kaj tiom pli, la kuristo ne facile sentas laciĝon de muskoloj.

Kvankam s-ro Takeuchi ne povis direkti trejnadon ĉiutage, tamen li rigardis ĉiun konkurson malgraŭ sia okupiteco. En 1987 Ĉinio okazigis la Sesan Tutlandan Sportkunvenon. Zhao Youfeng kaj Chen Qingmei revenis sian patrolan-



Zhao Youfeng kaj ŝia japana trejnistino Takeuchi

don kaj konkursis pri 5 000- kaj 10 000-metraĵ kuroj. S-ro Takeuchi venis al Ĉinio kune kun ili por rigardi la konkurson. Kiam Zhao Youfeng devis partopreni en la 24-aj Olimpiaj Ludoj en Seulo, li veturis al la urbo antaŭ la konkurso kaj dum kelke da tagoj faris videoregistradon al la maratona vojo. Li kune kun ŝi analizis la vojon kaj surbaze de tio ellaboris taŭgan planon.

La sukceso en la konkurso rekompencis lian penadon. Marte de 1987, kiam Zhao Youfeng unuafoje partoprenis en maratona konkurso, ŝia rezulto estis 2:43'48"; marte de 1988 ŝi partoprenis en samspeca konkurso kaj altigis sian rezulton je 15'92"; kaj en la 24-aj Olimpiaj Ludoj ŝi gajnis la kvinan lokon per 2:27'06". Nun ŝia rezulto estas starema en 2:30'. Post nur du jaroj ŝi enviciĝis inter la elstaraj maratonistinoj en la mondo. ■

Al nia rond' vi ĉiam mankos!...

— Funebre al Honfan*

Honfan! Honfan! Honfan!
sepdeknaŭjara veteran',
foriris — kun talent' kaj plan'!
Laborojn viajn multaj dankos!...
Al nia rond' vi ĉiam mankos!...

Honfan! Honfan! Honfan!
granda, fidela civitan'
de nia verdstelflaga lando,
plencelkonscia batalanto
por amikeco kaj mondpaco,
soldato brava kaj sen laco...
Duonjarcenton vi aktivis,
multege faris, iniciativis:
vi instruadis en K E L;*
vi amzorgadis pri Ĉ E L;*
vi diligentis por E P Ĉ,
por ke aŭdiĝu ĉina voĉo;
por plialtig' de l' lingvopovo,
kreiĝis per vi la E Ĉ V...*
Vi multon multon planis fari,
kaj l' vivon vi ne sciis ŝpari!

Vi nin konsilis kaj admonis,
ekzemplon brilan al ni donis.
Amikojn vi akiris monde,
per verkoj kaj perkoresponde...

Honfan! Honfan! Honfan!
senvorte vi subite pasis,
domaĝajn korojn vi postlasis!
Ni scias, ke vi ne revenos,
kaj tio ĉiam nin ĉagrenos!...

Honfan! Honfan! Honfan!
foriris — kun talent' kaj plan'!
Laborojn viajn multaj dankos!...
Al nia rond' vi ĉiam mankos!...

LAŬLUM, aŭg. 1989, Pekino

* Honfan, plumnomo de Zhang Hongfan (1910-1989), estis unu el la tri instruistoj de KEL (Koresponda Esperanto-Lernejo), kiu elbakis milojn da esperantistoj dum la Kontraŭ-japana Rezistmilto, laboradis kiel komitatano de ĈEL (Ĉina Esperanto-Ligo) kaj kiel unu el la plej fruaj laborantoj en la redakcio de EPĈ (El Popola Ĉinio) kaj ĉefredatoro de EĈV (Esperanto-Ĉina Vortaro), la plej granda en sia speco ĝis nun.

EPĈ anoncas novajn servojn

En la pasintaj jaroj, pro la praktikado de la politikoj de reformado kaj pordmalfermo en Ĉinio kaj pli kaj pli vasta aplikado de Esperanto en multaj kampoj, nemal-multaj el niaj legantoj petis nin peri por ili aĉeton de ĉinmedicinaj medikamentoj, poŝtmarkoj, produktaĵoj de Ĉinio, aŭ aperigi iliajn anoncojn, reklamojn k.a. Responde al tio ni decidis komenci en la unua de decembro de 1989 tiujn servojn kontraŭpage kaj renovigi la anonctarifon. Jen la tarifo:

- I. Por korespondanonco
2 internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj (50% da rabato ni donas al Esperantaj organizoj kaj niaj perantoj)
- II. Por perado de aĉeto
20% de la kosto por la aĉetaĵoj kiel makleraĵo

- III. Por Esperantaj anonco kaj reklamo
1 paĝo nigra-blanka 400 USD, 1/2 p. 250 USD, 1/4 p. 130 USD, 1/8 p. 70 USD, 1/16 p. 40 USD.
- IV. Por komerca reklamo
1 paĝo kolora dorskovrila 1700 USD, 1/2 p. 900 USD,
1 p. interna kolora 1500 USD, 1/2 p. 800 USD,
1 P. interna nigra-blanka 700 USD, 1/2 400 USD.

La varbintojn de reklamoj ni rekomencos per 10% de la enspezo.

Bonvolu sendi vian pagon al:

El Popola Ĉinio, 24 Baiwanzhuang Rd.
P/A BANK OF CHINA (Head Office), Beijing,
China

ESP-NOVAĴOJ

● En septembro 1989 fondiĝis la Maoming-a Esperanto-Asocio en la fama petrola urbo Maoming de Guangdong-provinco kaj la Lianyungang-a Esperanto-Asocio en Jiangsu-provinco.

● En la 5-a de septembro 1989 komenciĝis Esperanta kurso, fondita kune de la Hebei-a Esperanto-Asocio kaj la fremdlingva fakultato de la Hebei-a Normala Instituto. Kvindek studentoj partoprenas en la lernado, kiu daŭros unu jaron.

● En la dua tagdeko de septembro 1989 komenciĝis du Esperantaj kursoj en la Dalian-a Universitato. Unu estas nedeviga por studentoj de la fremdlingva fakultato de la Normala Instituto sub la Dalian-a Universitato. La alia estas fondita de la lingvo-trejna centro de la nomita universitato. 23 studentoj el la Politekniko kaj la Normala Instituto sub la nomita universitato kaj el aliaj altlernejoj partoprenas en la lernado.

● De la 29-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1989 la Tangshan-a Esperanto-Asocio organizis la someran kampadon en la urboj Tangshan kaj Qinhuangdao. 40 esperantistoj partoprenis en la aktivado kaj vizitis la belan Bohai-golfon.

● Por la 40-jara jubileo de la fondiĝo de EPC, la Dalian-a Plasta Kolora Presejo donacis al la redakcio de EPC 5 000 juanojn. Liu Lichun, estrino de la presejo, persone veturis kun la monsumo al Pekino kaj deziris, ke EPC atingu pli kaj pli grandajn sukcesojn en la venontaj jaroj.

● Lastatempe la Jiangxi-a Alume-ta Fabriko kaj la Nanchang-a Junulara Esperanto-Asocio kune faris grandan Esperantan etiketon, kiu longas 170 milimetrojn kaj larĝas 112 milimetrojn. Ĝi estas la plej granda tiaspeca etiketo en Ĉinio.

● Por celebri la 40-jaran jubileon de la fondiĝo de la Ĉina Popola

Respubliko, la Changshu-a Poŝto de Jiangsu-provinco en la 1-a de oktobro 1989 emisiis la unuataĝan koverton de Esperanto kaj ekuzis la memorigan poŝtstampilon de Esperanto. Antaŭ tio la poŝto faris en la 28-a de septembro Esperantan poŝtstampilon por festi la 2 540-an datrevenon de la naskiĝo de Konfuceo, fama pensulo kaj edukisto de la antikva Ĉinio. En la 29-a de septembro la poŝto faris ankaŭ Esperantan poŝtstampilon okaze de la Dua Kultura kaj Arta Festivalo en Changshu.

● Fondiĝis en 1988 en Francio la firma INTERLAND, kiu laboras por akceli la praktikan uzon de Esperanto en la ekonomio. Ĝia ĉefa servo estas instrui Esperanton en la diverslandaj entreprenoj de industriaj grupoj, cele al facila kaj malaltkosta interna komuniko inter la diverslingvaj teknikistoj kaj laboristoj. Ĉiuj interesatoj pri helpo (por mallongaj komisionoj kun makleraĵo) aŭ pri financa partopreno (por aĉeti akciojn po 140 frankoj) kontaktu nin! INTERLAND, 25 bvd Jules Sandeau, F-75016 Parizo, Francio.

● Dum kelkaj jaroj la Venezuelana Esperanto-Unuiĝo (VEU) aktive kaj fervore disvastigis Esperanton en Venezuelo per kursoj en lernejoj, kulturaj centroj, blindulaj asocioj, universitatoj kaj organizis E-festivalojn kaj ekspoziciojn. Lastatempe ĝi inaŭguris la unuan Esperanto-monumenton en Venezuelo. Tamen VEU havas grandajn monajn problemojn kaj pro tio petas monhelpon de ĉiuj eksterlandaj amikoj. Bonvolu sendi senriske usonajn bankbiletojn per la poŝto al Venezuelo aŭ ĉekon al la ŝparkonto je la nomo de S-ro David G. Valecillos V., prezidanto de VEU, Calle 79 N-ro 3c-72, Maracaibo-4002, Venezuelo. La n-ro de la ŝparkonto estas 1054 — 14978-0 (Banco Union-Agencia Centro, Maracaibo).

● Fine de julio publikiĝis de la eldonejo Horizonte-Verlag en Rosenheim (FRG) nova libro kun la titolo "Unueco en Diverseco", kiun



La unua Esperanto-monumento en Venezuelo



Li Lichun (meze) kaj respondeculo de la redakcio de EPC (dekstre)

tradukis du membroj de la Bahaa Esperanto-Ligo el la angla lingvo en Esperanton kaj kompilis la hindon 0. P. Ghai el la sanktaj skriboj de 12 religioj.

● En Tanzanio aperis nova revuo "Orienta Stelo" en 1989. Ĝi estas publikigita de la Tabora Esperanto Federacio kaj donas al ni novaĵojn pri E-movado en Tanzanio.

Aperis ankaŭ alia internacia kultura-literatura revuo en Esperanto "ILTIS-FORUMO" en FRG. La redakcio petas la aŭtorojn kontribui, la legantojn aboni kaj rekomendi. La adreso: ILTIS-VERLAG ELDONEJO ILTIS Postfach 1530 D-6670 St. Ingbert FRG.

● S-ino Anna-Lusa Ali Simola el Finnlando gajnis la 3-an premion en la branĉo "Fotografio" pro la verko "Esperanta ekspozicio" en la Belartaj Konkursoj de la Unversala Esperanto-Asocio por la jaro 1989.

Ĉina ŝako (I)

de RONG HUI

Post aperigo de artikolo pri fundamentaj scioj de la ĉina ŝako en la unua numero de 1988 ni ricevis leterojn de M. Ruslan de Sovetunio, O. Bjornsrud de Norvegio, W. Gorzkowski de Pollando k.a., kiuj deziras scii la leĝojn de la ĉina ŝako pli detale. Por kontentigi ilian deziron, ni aperigas kurson de la ĉina ŝako ekde ĉi tiu numero.

Ni volonte servas al vi, se vi volas aĉeti ŝakpecaron. La prezo varias inter 10-25 usonaj dolaroj.

La red.

ŜAKPECOJ KAJ ŜAKTABULO

La ĉina ŝako konsistas el ŝakpecoj kaj ŝaktabulo. Ruĝa kaj nigra partioj havas po 16 pecojn, t.e. unu ĉefgeneralon, 2 gvardianojn, 2 elefantojn, 2 ĉarojn, 2 ĉevalojn, 2 kanonojn kaj 5 soldatojn. Jen la ĉinlingvaj nomoj de tiuj ŝakpecoj (Vd. bildon 1).

Ŝaktabulo konsistas el 9 ortaj, 10 laŭlarĝaj linioj kaj 4 diagonaloj. Ili interkruciĝas kaj formas 90 kruciĝojn. Du laŭlarĝaj linioj sidas meze de la tabulo kaj dividas la tabulon en du egalajn partojn. Oni nomas la spacon inter la du linioj "limrivero". La ruĝa kaj nigra partioj havas po 9 numeritajn ortajn liniojn de dekstre maldekstren (Vd. bildon 2). Ekzemple, la 2-a orta linio de la nigra partio estas la 8-a de la ruĝa.

Bildo 1

帥 (shuai)	將 (jiang)	ĉefgeneralo
士 (shi)	士 (shi)	gvardiano
相 (xiang)	象 (xiang)	elefanto
車 (ju)	車 (ju)	ĉaro
馬 (ma)	馬 (ma)	ĉevalo
炮 (pao)	炮 (pao)	kanono
兵 (bing)	卒 (zu)	soldato

Cetere, 4 kvadratoj kunligitaj de 2 diagonaloj meze ĉe ambaŭ bazaj linioj de la ŝaktabulo nomiĝas "palaco".

LEĜOJ DE LA ĈINA ŜAKO

La ĉina ŝako estas ludata de du homoj. Antaŭ la ludo oni devas meti la 32 ŝakpecojn en difinitaj lokoj (Vd. bildon 2).

La ŝakludo ĝenerale dividiĝas en tri stadioj, nome: la komenca, meza kaj lasta. Kiu movas ŝakpecon la unua estas nomata antaŭa movfaranto kaj la alia — posta movfaranto. La du ludantoj movas sian pecon alterne, kaj oni nomas la du alternajn movojn unu fazo.

Laŭ la bezono de ofensivo aŭ defensivo la ludanto povas kapti interŝanĝi pecojn, escepte de la ĉefgeneraloj. Kaptanta peco anstataŭas la kaptitan, kiu estas forprenita de la ŝaktabulo, kaj okupas la lokon, se nur la kaptanta peco povas atingi la lokon laŭ la reguloj.

La ĉaro ĉiam iras laŭ senobstrukcaj linioj, antaŭen, malantaŭen, dekstren aŭ maldekstren, sen paŝo-limigo (1 paŝo: la distanco inter du najbaraj interkruciĝaj punktoj).


La ĉevalo ĉiufoje iras unu paŝon laŭlinie kaj alian paŝon laŭdiagonale. Se estas obstrukca peco sur la vojo, la ĉevalo ne povas transsalti, tio estas nomata "obstrukco al ĉevalo" (Vd. bildon 3).

La kanono ĉiufoje iras kiel la ĉaro. Kaj ĝi povas kapti pecon de la rivalo, nur kiam sur ĝia vojo troviĝas iu alia peco, kiu nomiĝas "afusto".

La soldato ĉiufoje iras unu paŝon antaŭen antaŭ transiro de la limrivero kaj paŝon antaŭen, dekstren


Bildo 2

NIGRA PARTIO




RUGA PARTIO

Bildo 3



Bildo 4



aŭ maldekstren post la transiro de la limrivero, sed neniam malantaŭen.

La gardiano ĉiufoje antaŭenriras aŭ retroiras unu paŝon diagonale en la kadro de la palaco. Al ĝi estas malpermesate eliri el la palaco.

La elefanto ĉiufoje povas antaŭeniri aŭ retroiri du paŝojn diagonale, sed ne estas permesata transiri la limriveron. Kiam estas alia peco meze de ĝia vojo, ĝi ne povas transsalti, tio estas nomata "blokado al elefanto" (Vd. bildon 4).

La ĉefgeneralulo ĉiufoje iras unu paŝon antaŭen, malantaŭen, dekstren aŭ maldekstren en la kadro de la palaco kaj al ĝi estas malpermesate eliri el la palaco. Al la ĉefgeneraluloj estas malpermesate kapte interŝanĝigi kaj fronti unu kontraŭ la alia sur la sama linio, sur kiu troviĝas neniu alia peco. ■

KORESPONDI DEZIRAS

* Ulrike Cizek, 20-j. studentino pri kemio, dez. kor. kun junuloj pri arto, botaniko, fotografaĵo, libroj, lingvoj kaj muziko. Adr.: K.-Liebknecht-Str. 10, Bautzen, 8600 GDR.

* Jeroen Sweyen, 14-j. knabo, dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj en la tuta mondo pri la vivkondiĉoj, hobiaj kaj interesoj. Adr.: Beukenlaan 32, NL 5541 VM Reusel, Nederlando.

* Katarzyna Paluch, 25-j. flegistino, dez. kor. tm. Adr.: 42-550 Sosnowiec, ul. Poplawskiego 20/33, Pollando.

* Aleksandro Kazankov, 16-j., dez. kor. Esperante kaj angle, interesiĝas pri ĉina kaj japana kulturoj. Adr.: Ŝkolnaja, 95A-8, nevelsk, SU-694740, Sovetunio.

* Barbara Schabowska, 14-j., volas kor. kun geknaboj por koni Esperanton bone, interesiĝas pri sporto, muziko, filmoj kaj bestoj. Adr.: ul. Kasprzaka 19/46, 08-110 Siedvce, Pollando.

* Dez. kor. internacie pri la internacia lingvo kiu kunigos nin. Baudoin Lambert, 204, Rue Sart Thiri, B-4230 Horion-Hozemont, Belgio.

* Herickson Barreira, 35-j. profesoro, dez. kor. tm. Esperante aŭ portugale pri radioamatorismo, komputado ktp. Adr.: PK 84052, Volta Redonda, RJ, Brazilo.

* Zdeňka Mocova, 32-j., dez. kor. pri diversaj temoj, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Adr.: Gotwaldova 621, 47201 Doksy, ĈSSR.

* Nova E-grupo Tuluzaj Esperanto-Fervojistoj dez. kor. tm. Adr.: S-ro Alain Turenne, 29, Le Castagne, 31450 Baziege, Francio.

* Aneta Sieczka, 18-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: ul. Zwirki i Wigury 30a/25, 42-503 Bedzin, Pollando.

* Morta Jasniska, 24-j. studentino, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj kaj kolektas gvidilojn, faldprospektojn, turismajn mapojn, bildkartojn kaj ornamitajn kovertojn kun leterpaperoj. Adr.: Kadlubek 24a/10, 32-500 Chrzanow, Pollando.

* Katarzyna Lewandowska dez. kor. tm. interesiĝas pri biologio kaj fiziko. Adr.: os Okrzei 2/121 97-400 Belchatow, Pollando.

* Ladislava Tlachova dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Probulov 47, 39807 Orlik n/Vltavou, Ĉeĥoslovakio.

* Jerzy Lewandowski, 41-j., interesiĝas pri turismo, literaturo, historio de aŭtomobilo, geografio, kolektas pm., bk., librojn kaj programojn de teatraĵoj. Adr.: ul. Gw Ludowej 21/56, 65-536 Zielona Gora, Pollando.

* Esperanto Klubo de Urbo Tamasi dez. kor. tm. pri gastronomio, foto, popolkutimo, modo kaj kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Adr.: Nagy Imre Esperanto Rondo, H-7090 Tamasi, Eotvos U. 16., Hungario.

* Krzysztof Tracz, 30-j. teknekonomiisto, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Str. Krzywoustego 3/10, 73-110 Stargard-Szczec, Pollando.



Trefkrucigo sur la meza rondforma ŝoseo

VIGLAS LA TUTA URBO

Teksto kaj fotoj de DA WEI

Tianjin estas unu el la tri municipoj rekte sub la centra registaro de Ĉinio. En la lastaj jaroj multaj ŝanĝiĝoj okazis en tiu antikva urbo. Por ke niaj legantoj informiĝu pri tio ni publikigos du artikolojn.

La Red.

EN la pasinta aŭtuno, mi vizitis la urbon Tianjin. Multaj tianjin-anoj interparolis kun mi pri sia urbo kun ĝojo kaj fiero.

Kiel nombri siajn proprajn trezorojn, ili konigis al mi la ŝanĝiĝojn de la urbo: la ĉielo fariĝis pli blua, tero pli verda, akvo pli dolĉa, domoj pli multaj, stratoj pli larĝaj kaj la urbo pli pura kaj pli bela... Eĉ mi, kiu naskiĝis kaj kreskis en la ĉefurbo Pekino, ne povas min teni de envio al ĝi.

Tianjin kun pli ol ok milionoj da loĝantoj estas urbo fama en la mondo kaj la dua granda industria havenurbo de Ĉinio. Sed dum pli ol 30 jaroj antaŭ 1981, ĝi suferis de "urbo-malsano". Tiam, en Tianjin cirkulis jena onidiro: "Veturi per aŭtobuso estas malpli rapide ol piediri. Malkonstrui la provizorajn kabanojn malpli rapide ol ilin konstrui. Per la akvo oni povas pekli legomojn sen doni salon." Tio montris la malfacilojn en la ĉiutaga vivo de tianjin-anoj kaj malhelpis la disvolviĝon de la tiea ekonomio.

En 1981, la Tianjin-a Registaro decidis transformi la urban fizionomion. Unue ĝi mobilizis la tutan

socion por malkonstrui la 51 000 barakojn starigitajn post la tertremo en Tangshan, 1976, kaj transloĝigi la 110 000 familiojn loĝantajn en ili. Tion ĝi faris nur en 4 monatoj, kaj poste finkonstruis en 16 monatoj kanalon 234 km. longan por konduki la bonkvalitan akvon de Luanhe-rivero en Tianjin kaj komplete finis la historion por tianjin-anoj trinki salan akvon el Haihe-rivero.

Post tio la registaro ĉiujare solvis kelkajn urĝajn problemojn en la vivo de la urbanoj, dum la lastaj montris siajn konfidon kaj subtenon al la registaro per granda entuziasmo en la laboro: Nun vere viglas la tuta urbo Tianjin!


ĈIE VIDIĜAS NOVAJ DOMOJ

Enirinte en la urbajn kvartalojn de Tianjin, mi estis tuj altirita de diversstilaj domoj blujaj kaj verdaj. Evidente, ili plejparte estis konstruitaj en la lastaj jaroj.

Respondeculo de la Tianjin-a Domo-administracio



Aŭtobusa haltejo



En nova loĝdomo

informis al mi, ke Tianjin nun praktikas novan politikon de la domkonstruo, t.e. unuigi konstruon de la novaj loĝkvartaloj kun transformo de la malnovaj. Ekde 1982 ili adoptis jenajn rimedojn: konstrui novajn loĝkvartaletojn kaj plilarĝigi la vojojn, rekonstrui danĝerajn kaj malnovajn domojn, kolekti monon por konstrui vendatajn domojn.

Fu Min, laboristino de la Impresfilma Fabriko, kun sia 7-membra familio loĝis antaŭe en du mallumaj ĉambroj. Nun ŝi kaj ŝiaj edzo kaj filino havas apartamenton el salono kaj 2 dormoĉambroj en la sudoriento de Tianjin, ŝiaj filo kaj bogepatroj loĝas

aliloke. Montrante la ĉambrojn bone meblitajn, Fu Min diris al mi: "Kiel bela kaj komforta estas la domo!" Ĉe tio mi legis en ŝiaj okuloj feliĉon.

Tiu 120-hektara loĝkvartalo konstruiĝis en 1983. Tie vivas pli ol 50 000 loĝantoj. En la lastaj jaroj, la registaro faris ĉioampleksan reordigon, akcelante la domkonstruon. Por beligi la medion, oni kulturigas florojn, arbojn kaj gazeton kaj konstruis ĝardenojn. Mi kun miro rimarkis, ke floroj prosperas sur balkonoj kaj visterio pendas sur fenestroj, inter la domoj kaŝiĝas kioskoj, pontetoj, fontanoj kaj ĝardenetoj.

En Tianjin troviĝas 14 tiaj loĝkvartaloj, kiuj

Balkonoj





En loĝkvartalo

plejparte estas ĝarden-similaj.

La urbanoj heredis de la malnova Tianjin ĉ. 6 milionojn da kvadrataj metroj da kadukaj domoj. Iuj el tiuj domoj estas nomataj “tri-malpli-alta fosaĵo”, t.e. la loĝdomo estas malpli alta ol la korto, la korto estas malpli alta ol la strateto kaj la strateto malpli alta ol la ĉefa strato. La loĝantoj de tiuj domaĉoj simplaj, krudaj, malvastaj kaj grandnombraj multe suferis de pluvo.

Komence de 1985, la urba registaro prenis reformadon de tiuj domaĉoj kiel unu el la gravaj taskoj por plibonigi la vivon de la loĝantoj kaj asignis grandan sumon por tiu afero. Dank’ al la zorgema aranĝo de la lokaj registaroj kaj peniga laboro de la loĝantoj, oni reformis en la jaro ĉiujn tiajn domojn kun areo de 250 000 kvadrataj metroj.

En milda pluveto mi venis en loĝdomon de Hexi-distrikto. Tie maljunuloj rakontis al mi, kiel ili vivis hieraŭ kaj vivas hodiaŭ. Antaŭe tie estis loĝejo de infanlaboristoj de la Beiyang-a Tekstilejo en la malnova Ĉinio. Oni priskribis ĝin tiel: “De pluvo akvo dronigis la litojn. De vento sablo frapis la murojn.” Informiĝinte, ke la domo estos baldaŭ reformita, la loĝantoj ege ĝojigis, volonte kontribuis monon kaj mem serĉis provizoran loĝejon por malpliigi problemojn al la registaro. 9 monatojn poste, la 500 familioj kun ĝojo revenis kaj enloĝigis en 7 novaj 7-etaĝaj domoj. Oni starigis monumenton, sur kiu la urbestro persone skribis: “Beiyang Xinli” (Nova Beiyang-kvartaleto).

En la lastaj 10 jaroj, Tianjin konstruis novajn loĝdomojn kun areo de pli ol 30 milionoj da kvadrataj metroj kaj rekonstruis arojn da danĝeraj domoj. Dank’ al tio, 100 000 familioj plibonigis siajn vivkondiĉojn. Kompreneble, la problemoj de loĝejoj ekzistas ankoraŭ en Tianjin, sed tamen, Tianjin faris ĝojigan paŝon en solvo de la problemo de loĝdomoj.

OPORTUNA TRAFIKO

Maljunaj urbanoj de Tianjin diris al mi, ke antaŭe

en Tianjin la stratoj estis en kompleta malordo, kio tre malhelpis la tian trafikon. Tiu fenomeno katenis Tianjin en la ekonomia disvolviĝo kaj plibonigo de la popola vivo eĉ en la komenco de la 80-aj jaroj.

Hodiaŭ, la sistemo de la arterioj rond- kaj radiformaj jam atingis certan gradon en Tianjin. En 1985 la registaro ellaboris la projekton pri trafika reordigo, t.e. konstrui 3 rondformajn ŝoseojn ĉirkaŭ la urbocentro kaj 14 arteriojn radiantajn de ĝi. Dank’ al tio bonordigis la tiea trafiko.

Februare de 1985, dekmiloj da vojlaboristoj komencis la konstruadon. Septembre de 1987, ekfunkciis sinsekve la meza rondforma ŝoseo kun longeco de 35 km. kaj la ekstera rondforma ŝoseo longa je 71 km. kaj 9 el la 14 arterioj radiantaj de la urbocentro. Nun en Tianjin fundamente formiĝis nova reto de la stratoj. La du rondformaj ŝoseoj ne nur faciligis la urban trafikon, sed ankaŭ alportis ekonomian efikon: ĉiujare 200 milionojn da juanoj.

Mi veturis sur meza rondforma ŝoseo larĝa je 50 m., dividita en koridorojn por aŭtoj kaj tiujn por bicikloj. Estas okulplaĉaj la freskoj, skulptaĵoj kaj aliaj pejzaĝoj ĉe la ŝoseo kaj la trefkruciĝoj elspiras modernan vivon.

Por pli bone koni la nunan staton de la publika trafiko de la urbo, mi vizitis la Tianjin-an Buroon de Publika Utiligo. Zhang Runtian, vicestro de la buroo sciigis al mi, ke la Tianjin-a Publik-trafika kompanio okupiĝas pri la transportaj aferoj de la urbo kaj iuj antaŭurbaj gubernioj. Kelkajn jarojn antaŭe pro trafika malfacilo la kompanio estis multe kritikita. Pasageroj plendis: “Aŭtobuso malfruas, kiam oni ĝin atendas. Oni ne povas enbusiĝi eĉ kiam ĝi venas, ĝi rampas malrapide kun homoj interpuŝigantaj ene. Elbusiĝi estas malfacile, kiam oni atingas la celon.” Nun tia fenomeno fariĝis malofta. En 1985 la kompanio ekhavis 500 novajn aŭtobusojn, malfermis kaj plilongigis 87 liniojn. Nun la aŭtobusoj kuras je 14.5 km/h, sed antaŭe nur je 12 km/h. ■

KVAR SISTEMOJ DE LA ĈINAJ PLADOJ

Teksto de WANG YANZI*

Fotoj de WANG DIHUAN

LA ĉinaj pladoj estas sinteza arto kun superbaj koloroj, odoroj, gustoj kaj formoj. Iliaj koloroj estas tre okulplaĉaj. La bonodoro de viando, fiŝoj, legomoj kaj fruktoj kaj la freŝeco, fragileco kaj aromo de la pladoj ĉe la manĝado estas apetitivekaj. Iliaj malsamaj formoj kaj gustoj estas allogaj. La belformaj pladoj impresas kiel metiartaĵoj.

Manĝi ĉinajn pladojn estas granda ĝuo.

La ĉina kulinara arto estas riĉa kultura trezoro. La ĉinaj pladoj havas pli ol dekmil specojn kun nacia, loka, palaca, restoracia kaj religia stiloj. Iuj el ili estas ne nur nutroriĉaj, sed ankaŭ kuracaj. La pladoj kun loka gusto estas plej distingigaj.

Kiuj pladoj kun loka gusto troviĝas en Ĉinio? Iuj diras, ke estas 8 sistemoj de la ĉinaj pladoj, t.e. la pladoj de Shandong, Guangdong, Sichuan, Jiangsu (Ĝjangsu), Hunan, Fujian (Fuĝjan), Anhui kaj Zhejiang (Ĝegĝang). Aliaj diras, ke en Ĉinio estas 10 sistemoj, t.e., krom la supre diritaj 8 sistemoj, estas ankaŭ tiuj de la pekinaj kaj Hubei-aj pladoj. Tamen neniu dubas pri la pozicio de la pladoj de Shandong, Guangdong, Sichuan kaj Jiangsu, ĉar la pladoj de Shandong originas el la malsupra baseno de la Flava Rivero, tiuj de Guangdong el la baseno de Perlorivero, tiuj de Sichuan el la supra baseno de Yangzi-rivero kaj tiuj de Jiangsu el la malsupra baseno de Yangzi-rivero. Ili reprezentas ne nur la nordon, sudon, okcidenton kaj orienton de la ĉina teritorio,

sed ankaŭ malsamajn odorojn kaj gustojn de la pladoj. La Shandong-aj pladoj estas salaj, tiun trajton portas preskaŭ ĉiuj pladoj de norda Ĉinio. La Guangdong-aj pladoj estas ne forte spicitaj kaj havas grandan influon en Fujian kaj aliaj lokoj de suda Ĉinio. La Sichuan-aj pladoj estas forte spicitaj per kapsiko kaj zantoksilaj fruktoj (*Zanthoxylum bungeanum*). Ili akra gusto havas grandan influon en Hunan, Yunnan kaj Guizhou (Gujĝoŭ). La Jiangsu-aj pladoj estas dolĉaj kaj modere spicitaj. Ili estas tre influaj en Jiangxi (Ĝjangŝji), Zhejiang kaj Anhui. Ĝuste pro la supre diritaj kaŭzoj la 4 sistemoj estas naturaj reprezentantoj de la ĉinaj pladoj.

SHANDONG-AJ PLADOJ

La baseno de la Flava Rivero estas lulilo de la ĉina nacio. Shandong-provinco en la malsupra baseno de la rivero estas unu el la originoj de la ĉina antikva kulturo. La tieaj pladoj kun longa historio multe influas la kuirarton de Pekino, Tianjin (Tjanĝin), Liaoning, Shanxi (Ŝanŝji) kaj regiono inter la Flava Rivero kaj Luoshui-rivero. En tiu sistemo aparte distingaj estas pladoj de maraj produktaĵoj kaj diversaj supoj. Ili ĉefe estas freŝaj kaj salaj.

La Shandong-aj pladoj estas komuna nomo de la Jinan(Ĝĵinan)-aj kaj Yantai-aj pladoj. La Jinan-aj pladoj estas famaj precipe pro diverseco de supoj. Kuiristoj de tiaj pladoj estas lertaj en fritado kaj stufado. La de ili preparitaj pladoj estas delikataj kaj fragilaj. La dolĉ-

acida karmo el la Flava Rivero estas fritbrunigita ekstere kaj mola interne. La brezita koko de Dezhou (Deĝoŭ) estas tre delikata kaj bongusta. Ĉe la manĝado la viando kaj osto disiĝas tuj ĉe la skuado. La pladoj de markolbasoj, ŝarkaj naĝiloj, salangan-nestoj kaj sekaj pektenoj preparitaj laŭ la Yantai-a stilo estas tre famaj. Ili, frititaj, brezitaj aŭ vaporumitaj, konservas la originalan sukcon kaj originalan guston. Famaj Yantai-aj pladoj estas supo el salangan-nestoj, frikakitaj litorinoj, fritita ostraĵo kaj vaporumita fiŝo spicita per kareo. Krome, estas famaj ankaŭ la pladoj de la Konfucea Domo. Ili kun historio de pli ol 2 000 jaroj estas esenca parto de la Shandong-aj pladoj.

GUANGDONG-AJ PLADOJ

Guangdong-provinco situas en la suda parto de Ĉinio. Tie ĉiam kreskas verdaj plantoj. La loko, abunda je kreskaĵoj kaj bestoj, provizas kuiristojn per riĉaj materialoj. La Guangdong-aj pladoj havas la kantonajn pladojn kiel la ĉefajn, inkl. tiujn de Hainan, Chaozhou (Ĉaŭĝoŭ) kaj Dongjiang (Dongĝĝang). Kuiristoj de Guangdong-aj pladoj prenas plej multajn objektojn kiel materialojn de la pladoj. Ili prenas preskaŭ ĉiajn bestojn, inkl. serpenton, katon, simion kaj muson. Ili estas lertaj en fritado, rostado, marinado, brezado kaj vaporumado kaj spicas ĉefe per saŭcoj ostra, salikoka kaj fiŝa. La Guangdong-aj pladoj estas glitaj, molaj, freŝaj kaj plezurigaj. Inter la Guangdong-aj






Fritita salmo

Foto de LIU RUI

Zantoksil-akra kokaĵo

Frititaj salikokoj






Bele aranĝitaj ovoj

Foto de LIU CHUNBAO

Rostado de porkido




pladoj famaj estas la brezitaj serpento, kato kaj koko, serpenta kustardo, rostita porkido, sale bakita koko, bolkuirita hundaĵo kaj bovaĵo spicita per ostra saŭco.

La plado el serpento kun historio de pli ol 2 000 jaroj estas aparte mirinda en la stilo. La supre menciitaj brezitaj serpento, kato kaj koko kaj serpenta kustardo estas la plej famaj el la centoj da serpentaj pladoj. Por la unua plado oni uzas najon, bungaron kaj ahaetulon (*Ahaetulla ahaetulla*). La akcesoraj materialoj estas strioj de kokaĵo, trufo, orelfungo, halioto (*Haliotis gigantea*) k.a. Por fari la pladon oni devas friti, vaporumi kaj brezi la materialojn ĉefajn kaj akcesorajn. La preparita plado estas ne nur belaspekta kaj bonodora, sed ankaŭ nutroriĉa. La serpenta kustardo el delikataj materialoj estas bongusta. Estas aparte bone, se oni manĝas la varman serpentan kustardon. La sale bakita koko de Dongjiang estas preparita en originala maniero. Oni unue tegas unu-jaran kokon per mesoentero kaj poste metas ĝin en vazon kun varmigita salo. La pretigita kokaĵo estas delikata kaj forte bonodora.

SICHUAN-AJ PLADOJ

Sichuan, konata kiel riĉe naturdotita lando, estas grava provinco en la sudokcidenta parto de Ĉinio. La Sichuan-aj pladoj estas famaj pro siaj apartaj gustoj zantoksila, akra, sala, dolĉa, acida, amara kaj bonodora. Por ilia preparado estas pli ol 30 manieroj, kiel peklado, peklado-boligado, fumajado, fritado kaj stufado. Per diversaj metodoj oni preparas pladojn kun diversaj gustoj, kiaj tiuj zantoksilakra, acidakra, stranga, aromvina, liĉia, akreta kaj salzantoksila. La ofte uzataj spicoj por la Sichuan-aj pladoj estas kapsiko, pipro, zantoksilaj fruktoj, zingibro kaj krome ankaŭ aromaj fermentintaj sojfaboj k.a. La diverseco de la gustoj de la Sichuan-aj pladoj estas senegala en la lando. La Sichuan-aj pladoj estas ĝenerala nomo de la pladoj de Chengdu,



Chen Songru (dekstre), eminenta kuiristo de Sichuan-aj pladoj

Chongqing (Ĉongĉing), Hechuan, Dongshan, Jiangjin (Ĝjangĝin), Zigong k.a. kun lokaj trajtoj. Ili estas multspecaj. Por festenoj la Sichuan-aj pladoj havas pli ol 1 000 specojn. La plej bone konataj estas zantoksilakra toŭfuo, kokaĵaj kuboĵoj kun arakidaj grajnoj, rizkrusto kun varma buljono, anaso spicita per kamforligno kaj teo, batita koko k.a. La zantoksilakra toŭfuo estas varma, mola, zantoksil-gusta, akra, bonodora kaj krome ankaŭ malmultekosta, tial ĝi multe plaĉas kaj al la sudaj kaj al la nordaj ĉinoj. La rizkrusto kun varma buljono estas farata laŭ jena maniero: oni dispartigas rizkruston kaj metas ĝin en pladon, verŝas sur ĝin la tuj preparitan varman buljonon el pecoj de porkaĵo, bambu-ŝosoj k.a. Ĉe la verŝo la krustaj pecoj brue krakas kaj leviĝas vaporo el la plado. La spektaklo estas tre interesa.

JIANGSU-AJ PLADOJ

De la antikveco Jiangsu-provinco estas abunda je fiŝoj kaj rizo. Multaj literaturistoj vizitis la lokon. En antikvaj ĉinaj poemoj kaj prozaĵoj legiĝas multaj versoj pri la tieaj frandaĵoj. La kuirarto de la Jiangsu-aj pladoj donas grandan atenton al stufado, vaporuma-

do kaj fritado. La pladoj estas dolĉaj kaj ne forte spicitaj. Ili konsistas ĉefe el la pladoj de Nankino, Yangzhou (Jangĝou), Zhenjiang (Ĝengĝang) kaj Suzhou (Sugou). Ili ĝenerale estas belaspektaj kaj delikate faritaj. La peklita anaso de Nankino estas belkolora kaj bongusta. La viandbuloĵoj de Yangzhou estas tre delikataj. La Zhenjiang-a viando estas bongusta, freŝa kaj fragila. La kukoj de Suzhou estas delikatformaj. Ili ĉiuj estas honoritaj kiel 4 belaj floroj de la Jiangsu-aj pladoj. La "Tri Anasoj" estas aparte delikata kaj interesa: Anasido en marĉo-anaso kaj marĉo-anaso en hejmo-anaso. La vaporumita makruro (*Macrura reevesii*) kaj fritita neosalankso (*Neosalanx taihuensis*) estas tre bongustaj kaj rememorigaj post la manĝado.

La ĉina kulinara arto estas trezoro de la ĉina kulturo kaj grava konsistiga parto de la monda kulturo. Dank' al la konigo de la elmi-grintaj ĉinoj dum longa tempo kaj la pli kaj pli kreskanta kultura interŝanĝo en la lastaj jaroj, la ĉinaj pladoj jam populariĝis en la tuta mondo kaj interesas multajn popolanojn. ■

* La aŭtoro estas vicsekciestro de la redakcio de "Ĉina Gastronomio".

Pri la poemo “Al Yuan’er, kiu veturas komisiite al Anxi¹”

de DI ZI

La poemo tekstas jene:

*En Weicheng² matenpluvo saturetis la stratpolvon,
Kaj ĉe l’ gastejo freŝe verdaj staras la salikoj.
Ankoraŭ unu glason malplenigu, mi vin petas,
Trans Yangguan³ okcidente ne troviĝos jam amikoj!*

Ĝi estas verkita de Wang Wei (701-761 p.K.), fama idilia poeto de Tang-dinastio (618-907). “Al Yuan’er, kiu veturas komisiite al Anxi” estas adiaŭa poemo verkita de Wang Wei por lia amiko Yuan’er. En la unuaj du versoj la poeto montris la lokon, tempon kaj atmosferon de la adiaŭo. Weicheng estis antikva urbo en okcidenta Ĉinio. Tie oni adiaŭis militistojn kaj komercistojn veturantajn el aŭ al la Okcidenta Regiono. Matene, post pluveto, en Weicheng la domoj estis puraj kaj la salikoj freŝe verdaj. Super la senfina kuriera vojo ŝvebis neniom da polvoj. La lastaj du versoj prezentas la adiaŭan scenon. La amiko estis ironta okcidenten al dezerto tra Yangguan-pasejo. Lin atendis malfacila, longa kaj soleca vojaĝo. Tio intensigis la tristan etoson ĉe la adiaŭo. Per kio la poeto devis komenci la parolon en tiu momento, kvankam li havis multon por diri? Jen li proponis glason da vino al la amiko por esprimi sian bedaŭron pri la adiaŭo.

La poeto bone kaptis esprimivan aferon kaj havis riĉan asociadon de ideoj. Ekz., en la komenco de la poemo li kreis tristan etoson ĉe la adiaŭo per priskribo de la pluvo. Li priskribis ankaŭ salikojn por intensigi la etoson, ĉar en la antikveco ĉinoj kutime donis salikajn branĉetojn al siaj amikoj por montri bedaŭron pri adiaŭo kaj ne perdi freŝecon de amikeco.


La pentristo uzis la teknikojn de la tradicia ĉina pentrado kaj ankaŭ enmiksitis en ilin modernajn teknikojn pri aranĝo de tuta bildo kaj homaj figuroj. En la fono de malhelverda koloro la poeto elstarigis etoson saturitan de tristo kaj espero ĉe la adiaŭo.

La kaligrafaĵo estas farita en kombino de la oficiala kaj sigela skribsistemoj. La strukturo estas mal-


strikta kaj la skribo liberstila, kvazaŭ la kaligrafo penus prezenti nebulan kaj freŝan etoson. ■

1. Anxi (Anŝji): En la nuna Xinjiang (Ŝinĝjang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono
2. Weicheng (Ŭejĉeng): Urbo nemalproksime de Chang’an, la ĉefurbo de Tang-dinastio
3. Yangguan (Janggŭan): Tiama landlima pasejo, en la nuna Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono

Kaligrafaĵo de Jin Jiezhong



袁勸君更進一杯酒
西出陽關無故人
故中王
維
詩
意
已
秋
巴
圖




Pentrajo farita de Jin Jiezhong por la poemo

柳青舍客塵輕

灑雨朝城渭

曲城渭



Korposanigaj metodoj (XI)

MEMBRAJ MALSANOJ

3. Genuiĝu kun la manoj mallevitaj kaj fleksu la korpon malsupren-antaŭen. Levu la kapon, kiam ĝi distancas de la tero je 15 cm. Etendu la maldekstran manon antaŭen kaj la dekstran post la dorson. Laŭeble etendu la manojn antaŭen kaj malantaŭen alterne 14 fojojn (Bildo 1). Tio povas forigi la doloron kaj malharmonion inter vitala energio kaj sangcirkulo en la brakoj.

4. Sidu surtere kun la dekstra gambo rektigita kaj la maldekstra fleksita. Ĉirkaŭprenu la maldekstran genuon, rektigu la talion, plenpulme enspiru per la nazo kaj elstarigu la bruston. Per la manoj premu la genuon al la brusto kaj ventro kaj malrapide elspiru per la buŝo. Malstreĉu la manojn. Tion faru 7 fojojn. Post tio, rektigu la maldekstran gambon, fleksu la dekstran kaj faru la samon. Tio povas forigi malfacilan fleksiĝon de la malsupraj membroj, doloron kaj paralizon de la kruroj ĉe kaŭriĝo kaj stariĝo.


5. Sidu rekte kun la piedoj etenditaj. Malstreĉu la tutan korpon kaj plenpulme spiru kelkajn fojojn kun la atento sur *dantian* (akupunktura punkto, je 1.5 coloj interne de la umbiliko) kaj konduku vitalan energion malsupren por senti agrablecon. Fleksu unu piedon kaj metu ĝin sub la genuon, kaj samtempe, rektigu la alian piedon kaj laŭeble levu la piedfingrojn. Kuŝiĝu surdorse kaj kiam la kapo estas tuj tuŝonta la liton, forte etendu la manojn antaŭen kaj levu la kapon kvazaŭ tiratan (Bildo 2). Faru ĉion ĉi rapide 14

fojojn. Alternigu la piedojn kaj faru la samon. Tio povas forigi la piedan doloron kaj malvarmon en la talio, ŝultroj, brakoj kaj dorso.

6. Genuiĝu per unu kruro kun la koksoj sur la piedo. Per la manoj forte levu la alian piedon kun la kalkano malsupren kaj la korpo malantaŭen (Bildo 3). Tenu la pozon por momento. Post tio, subtenu vin per la genuanta kruro, levu la fleksitan kruron kaj svingu la korpon 14 fojojn de malantaŭe al la centra punkto. Ripetu tion ankaŭ, kiam vi genuiĝas per la alia kruro. Tio povas forigi lacon, doloron en la piedoj kaj brakoj, malvarmon en la genuoj kaj malsupra korpoparto.

7. Kuŝu surdorse. Fleksu unu kruron kun la piedo surtere. Faru tion laŭeble forte. Per la mano tiru la maleolon kiel eble plej forte (Bildo 4), por ke la talio, piedo kaj maleolo estu malstreĉitaj. Per la alia mano premu la teron. Enspiru kaj movu la supran korpoparton antaŭen, kiam vi forte tiras la maleolon per la mano. Elspiru kaj fleksu la korpon malantaŭen, kiam vi iom malstreĉu la manon. Tion faru 21 fojojn. Alternigu la manojn kaj faru la samon. Tio povas forigi akran doloron kaŭzitan de varmo en la manoj, piedoj, talio kaj ŝultroj.

8. Premu la ŝultrojn per la polmoj. Movu la ŝultrojn 21 fojojn supren kaj malsupren kaj, post tio, laŭeble levu la kubutojn sen movi la manojn kaj movu la ŝultrojn 14 fojojn supren kaj malsupren. Pugniĝu la manojn 7 fojojn kaj knedu la ŝultrojn 21 fojojn. Tio povas kuraci spasman doloron kaj trostreĉon de la kolo kaj ŝultroj. Fleksu la



dekstran manon maldekstren al la dorso kaj tiru internen la dekstran kubuton per la maldekstra. Tion faru kelkan tempon. Malfleksu la dekstran manon. Fleksu kaj malfleksu ĝiajn fingrojn 3 fojojn. Faru

Libro pri historio de Ĉinio

5 000 JAROJ DE ĈINIO verkita de Caŭ Bajlong, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1988 kaj distribuata de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio. Formato: 13 × 18.5 cm, 388 p. Prezo: 5.95 USD.

La libro estas eldonita en la tempo, kiam pli kaj pli multe da eksterlandanoj deziras fundamentajn sciojn de la historio de Ĉinio. Per lakona lingvo kaj abundaj historiaj materialoj la libro konigas la disvolviĝon de la socioj primitiva kaj sklava al la feŭda en Ĉinio, la naskiĝon, evoluon kaj pereon de ĉiuj dinastioj kaj ekonomiajn, sciencajn kaj kulturajn atingojn akiritajn en la dinastioj. Ĝi prezentas ĉefe gravajn eventojn de diversaj periodoj, eminentajn personojn, interrilatojn inter ĉiuj naciecoj de Ĉinio kaj amikajn kontaktojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj. En la libro legiĝas antikvaj legendoj kaj belaj mitoj. En ĝi vidiĝas bildoj pri multaj gravaj historiaj personoj.

Niaj legantoj trovos la bildon de la modelo de la sismografo farita de Ĝang Heng en la Orienta Handinastio (25-220), parton de la mondfama pentraĵo "Scenoj apud Rivero en la Festo de Klaro kaj Brilo" k.a., ĝuos interesajn anekdotojn pri Bjan Ĉjue, Hŭa Mulan, Ŭang Ŝjiĝi kaj Ŝjüanzang kaj konos la faman Silkan Vojon, ĝiajn evoluon kaj gravan rolon

tion per la maldekstra mano. Forte faru la samon po 28 fojojn. Tio povas forigi spasman doloron en la ŝultroj kaj kubutojn. Etendu la manojn kaj laŭeble levu ilin. Tion

faru 21 fojojn. Laŭeble etendu la kubutojn eksteren 7 fojojn sen movi la manojn. Turnu la korpon 21 fojojn dekstren kaj maldekstren sen movi la manojn, kubutojn kaj



en la historio.

Krome, la lingvo de la libro estas facila kaj tre utila por levi la lingvonivelon de komencantoj. Ĝi estas ankaŭ necesa presaĵo por diletantoj de Esperantaĵoj kaj, kompreneble, nemankigebla por tiuj, kiuj volas koni Ĉinion.

Sendube, en la libro troviĝas iuj mankoj. Laŭ mi, ĝi iasence prezentas senkohere la historion de Ĉinio. Koncerne la paĝaranĝon, estas ankaŭ mankoj. La grandeco de bildoj pri historiaj personoj ne estas konforma al ilia graveco en la historio, ekz., imperiestro Tajzong de Tang-dinastio (618-907) faris gravan kontribuon en la ĉina historio, sed oni aranĝis por li nur malgrandan bildon (p. 171), kiu prezentas, kiel li atente aŭskultas konsilojn de sia subulo, dum imperiestro Ĝuangŝju faris neniun gravan kontribuon en la historio, sed oni aranĝis por li pli-ol-duonpaĝan bildon (p. 362). Krome, la transskribo de propraj nomoj refoje enkondukas niajn legantojn en labirinton. Mi pensas, ke tio spegulas la perpleksecon de la ĉinaj esperantistoj tiuflanke. Kaj plie, estas ankaŭ iuj preseraroj, ekz., en la teksto la nomo de eminenta politikisto de Ŝu-regno estas Ĝuge Ljang, sed en la teksto de la bildo sur p. 138 ĝi mispresigaĵas kiel Ĝu Geljang.

Recenzis LIU CAISHENG

brakojn. Tio povas forigi malvarmon, spasmon, doloron kaj malfacilan moviĝon de la kruroj.


Daŭrigota

La Karnavalo de londonaj nigruloj

EN la tria tagdeko de aŭgusto ĉiujare loĝantoj de nigrula kvartalo en la suda Londono okazigas grandiozan aktivadon, nome Karnavalon. Sed ĝi, kun historio de 40 jaroj, havas nenian religian signifon, nek rilaton kun la tradicia Karnavalo okazigita de kristanoj antaŭ Karesmo. Komence nur afrikaj elmigrintoj spontanee kuniĝis por fari celebradon en aparta maniero. Poste, kun multiĝo de nigruloj en Eŭropo kaj profundigo de ilia socia influo, en pli kaj pli vastaj regionoj oni celebras la Karnavalon kaj kreskas la nombro de ĝiaj partoprenantoj. Kvankam la tieaj nigruloj vivas malproksime de sia hejmloko de multaj jaroj, eĉ de antaŭ kelkaj generacioj, tamen ili neniam ŝanĝis sian ardan kaj liberan karakteron nutritan de la afrikaj arbaroj kaj herbejoj. Ili vivas en la lando de blankuloj, sed ili ĉiam estas korinklinaj al la fora Afriko.

La Karnavalo de londonaj nigruloj estas plena de densa nacia koloro. La festantoj paradas en groteskaj maskoj kaj vestoj. Iuj malrapide veturas per buntaj ĉaroj kaj aliaj, en primitivaj vestoj kaj kun diversaj ornamaĵoj, marŝante dancadas afrikajn dancojn. Dekkelkaj stratoj estas ŝtopitaj de festantoj kaj rigardantoj. Sonas surdiga tamburado kaj gaja kantado, kiuj aŭdiĝas eĉ kelkajn kilometrojn fore.





KONTRIBUU POR LA RUBRIKO "MI KAJ ĈINIO"

Karaj legantoj

Por festi la 40-jariĝon de EPĈ en la venonta majo, ni petas vian kontribuon por la rubriko "Mi kaj Ĉinio".

Vi povas verki pri: impreso pri Ĉinio, amika kontakto kun ĉinoj aŭ ĉinaj esperantistoj, amikeco kun EPĈ ktp. Via artikolo povas esti en ajna stilo aŭ formo, sed ne pli-ol-tri-paĝa (laŭ la formato de EPĈ). Bonvenaj estas koncernaj fotoj (inkl. de portreto de la aŭtoro). Limdato: la 31-a de januaro 1990 (laŭ vialoka poŝtstampo).

Ni aperigos bonajn verkojn el la kontribuoj en EPĈ. Ni aljuĝos la unuan premion al 1, duan premion al 3 kaj trian premion al 5 kontribuintoj. La premioj estos ĉinaj metiartaĵoj. Nepremiitaj kontribuintoj ricevos donaceton.

La rezulto de la aljuĝo legiĝos en la 6-a numero de 1990.

Ni anticipas dankas vin por la kunlaboro.

La Red.

INTERVJUOJ

LA UNUA VIRINO EN LA "MORTA ZONO"

de HU YUN

EN malgranda hotelo de Pekino mi intervjuis ŝin, kiu kiel la unua virino en la mondo eniris en la internon de Antarkto. Ŝi estas Jin Qingmin, asist-esploristino de la Nankina Geologia kaj Mineralogia Instituto de Ĉinio.

Ŝi, 1.55 m. alta kaj 52 kg. peza, estas 49-jara. Tiam ŝi estis prenanta vespermanĝon sur lito. Ŝi aspektis iom laca kaj manĝis lante. Mi neniel povis asocii ŝin kun Antarkto kaj la "morta zono", vidinte ĉion ĉi. Sed tuj kiam ŝi ekrakontis al mi pri Antarkto, ŝia laceco malaperis kaj ŝia parolo pleniĝis de firmeco.

FLUGI AL LA "MORTA ZONO"

"Mi dufoje vizitis Antarkton. De oktobro 1986 ĝis majo 1987 mi, kiel la ununura sciencistino, partoprenis la trian ĉinan esploradon pri Antarkto kaj la unuan tutmondan sciencon esploradon. Mi laboris 77

tagojn en Changcheng-stacio sur la insulo Reĝo George kaj akiris valorajn geologiajn materialojn."

"Tamen en Changcheng-stacio (62°13'S) sin trovas ekster la antarkta cirklo. Mi revis enpaŝi la cirklon kaj eniri la internon de Antarkto," ŝi daŭrigis. "Kiam mi laboris en Changcheng-stacio, mi konatigis kun fama usona esploristo s-ro Maceal Dunn. Mi informiĝis de li, ke li pretas organizi ĉinajn kaj usonajn sportistojn por fari esploradon en la regiono Vinson (78°30'S). Kaj mi ekhavis la ŝancon kaj fine realigis mian re-



Jin Qingmin

von."

Antaŭ ol fari viziton al Jin Qingmin, mi fosis en materialoj pri Antarkto. Vinson estas la plej alta montpinto en Antarkto kaj nomata "morta zono". Tie la jara temperaturo varias inter 40°-80°C sub la nulo, staras apikaj montoj en la spaco de miloj da km. kaj kontin-

uas glaciriveroj kaj neĝvaloj. En 1957 Vinson estis malkovrita. Ekde tiam ĝi estis blanka regiono por geologia esplorado. Antaŭe la lokon vizitis neniu virino. Jin estis feliĉa, tamen malfaciloj kaj danĝeroj atendis ŝin.

Jin diris al mi, ke la 22-an de novembro 1988 ŝi kaj aliaj 24 kolegoj prenis manĝon en la atendejo de la aerodromo de Punta Arenas en la plej suda Ĉilio kaj estis veturontaj de tie per speciala aviadilo al Vinson. Subite eniris piloto kaj donis al ili noton de la usona registaro. La konciza enhavo estis, ke la medio de Vinson estas sufiĉe malfavora kaj la fluglinio longa, kaj pro tio eble okazos akcidento. La usona registaro postulis de ĉiu esploristo subskribi la noton, antaŭ ol ascendi la aviadilon. Tiutempe regis silento en la atendejo.

Rememorante tiun sperton, Jin emocie diris: "La Scienc-esplora Interkonsento pri Kuna Montogrimpo de Ĉinio kaj Usono specifas, ke la viktimoj devas esti enterigitaj ĉeloke, se okazos akcidento dum la scienca esplorado. Tial, antaŭ ol forlasi la hejmon, mi faris ĉiujn preparojn. Mi alvokis miajn infanojn kaj donis admonon al ili. Post kiam mi atingis Pekinon, mi sendis leterojn al ili. Mi diris al ili ĉion, kion mi volis. Tiam mi estis trankvila kaj decideme subskribis."

BLANKA KAMPADEJO

Transfluginte milojn da glacimontoj sur Dreke-markolo 570 km. larĝaj kaj rompinte la pli-ol-12-gradan ciklonon en la regiono, post 11 horoj, ŝi atingis la kampadejon de Ellsworth-altaĵo starigitan de la Internacia Esplorista Reto. Poste ŝi prenis malgrandan aviadilon kaj atingis la montogrimpistan ĉefstabejon je 200 km. for de la montpinto Vinson. Apenaŭ Jin elpaŝis el la kajuto, antaŭ ŝi prezentiĝis blanka mondo: blankaj glacikampoj kaj montpintoj. La suno radiis al la neĝkampo, kiu resendis okulpikan lumon.

Jin daŭrigis kun rideto: "Ia-

tempe mi sentis, ke la antarkta pejzaĝo estas eksterordinare ĉarma, la ĉirkaŭaĵo estas tiel blanka kaj la ĉielo tiel blua. Ne aŭdiĝas hombruo, nek kverelo. Sed la antarkta vento estas terura. Atinginte la kampadejon, ni starigis tendon. Por ŝirmi nin kontraŭ ŝtormo, ni fiksas la tendon per neĝo kaj glaciabloj kaj konstruis ĉirkaŭ ĝi glacimuron altan je pli ol unu homo. Rigardate de malproksime, ĝi aspektas kiel blanka kastelo."

"Nokte de la 27-a de novembro ŝtormo furioziĝis, la tendo krakis en la ventego. Ni surmetis ĉiujn vestojn, sed estis vane. En la sekvanta mateno ni vidis, ke niaj vestoj kaj litkovriloj estas kovritaj de tavolo da glacio."

Fakte, tiutempe regis somero en la regiono Vinson. La suno brilis de mateno ĝis vespero, tamen la temperaturo restis ĉ. 40°C sub la nulo. Ĉiuj esploristoj tremis de frosto. La elspira aero fariĝis glacieroj, kiuj alkroĉiĝis al la brovoj kaj barboj de la esploristoj. Ili ĉiuj aspektis kiel kristnaskaj olduloj. Jin diris: "Tie la vivo estis ja malfacila. Mi ne lavis al mi la vizaĝon 5-6 tagojn. Estis tre malfacile trinki kaj manĝi. Por boligi malgrandan kruĉon da akvo, oni bezonis unu horon. Dum trinkado la boligita akvo glaciĝis. Mia kolego Li Zhixin trinkis el kulero, kiu froste algluiĝis al lia lango. Li ĝin fortiris haste kaj deŝiris langhaŭton."

"La 28-an de novembro ni ekiris al Vinson. Unue ni translokiĝis de la ĉefstabejo al la kampadejo n-ro 2. La vojo estis nur 3 km. longa kaj kovrita de glacio, sur kiu estis multaj fendoj. Krome, ni devis grimpi 700-metran glacimuron, malmolan kaj krutan. Se oni perdus iomete singardemon, oni falus en glacivalon. Ni malrapide antaŭenmoviĝis. Foje, mia piedo falis en fendon. Dank' al helpo de miaj kolegoj, mi estis savita. La tempo por ni en Antarkto estis mallonga. Se mi farus scienca esploron post la montogrimpo, la tempo eble ne permesus. Mi do decidis forlasi suprengrimpadon por plenumi mian ĉefan taskon fari geologian esploron."

NUR ŜI SOLA SUR LA GLACIKAMPO

La 29-an de novembro la kolegoj de Jin Qingmin foriris por surgrimpi la pinton Vinson. En la ĉefstabejo restis nur ŝi sola. Sur la glacikampo ne estas floroj kaj herboj, nek bestoj nek homoj, ŝin akompanis nur la malgranda tendo kaj muĝanta ŝtormo.

Kun bedaŭro, ke ŝi ne povis surgrimpi la pinton, ŝi komencis sian streĉan laboron. Kiam ŝi rememoris la 4 tagojn, ŝiaj okuloj radiis. Ŝi diris: "En tiuj tagoj mi estis energia, forgesante kaj manĝi kaj dormi. Ĉiutage mi, en 4 kg. pezaj botoj kaj kun aparatoj surdorse, grimpis jen supren jen malsupren sur la glacikampo, kaj miaj maleoloj ŝveliĝis de frotado. Tiam mi volus formeti la botojn. Mi eliris antaŭtagmeze kaj revenis la sekvantan matenon. En la kvar tagoj mi kolektis 40 kilogramojn da specimenoj de mineraloj, desegnis 5 geologiajn sekcojn kaj faris multe da notoj."

Aŭskultante ŝian rakonton, mi demandis: "Ĉu vi ne timas tion?" Ŝi malkaŝe respondis: "Mi timis iatempe. Iun tagon furioza ŝtormo preskaŭ forvolvis mian tendon. Mi, kuŝante en lanuga dormsako kaj kun varmiga medikamento sur la brusto, ankoraŭ ne povis endormiĝi pro frosto. La muĝanta ŝtormo forte timigis min."


La 2-an de decembro, la lastan tagon de la esplorado por Jin, ŝi trovis ferminon ĉe monteĝo 3 000 m. super la marnivelo. Ĝi estas hematita regiono 20 km. longa kaj 200 m. larĝa, kun ferenteno de 30-50%. Jin diris: "Tiam mi ege emociiĝis. Por trovi nudan parton de la hematita regiono, mi iris 11 km. laŭ kruta monto. Miaj manoj vundiĝis de rokpinto kaj miaj ŝuoj truiĝis. Foje, miaj piedoj glitis en glacifendon, mi alkroĉis la glacipecon al glaciablo kaj per la tuta forto grimpis supren. Suprengrimpite ĝin, mi elprenis kvinstelan ruĝan flagon de nia lando kaj ĝin fiksas sur la loko." ■



Jin Qingmin (meze) kaj ŝiaj kolegoj ĉe Vinson



Jin Qingmin en geologia esplorado



Jin Qingmin en la ĉefstabejo

● En la pasintaj 40 jaroj Ĉinio produktis 1.7 miliardojn da tunoj da ŝtalo kaj fero. En 1949 ĝia produktokvanto de ŝtalo okupis la 26-an lokon en la mondo, kaj nun la kvaran.

● De 1949 ĝis nun ĉinaj geologoj faris boraĵojn kun totala longo de 289.88 milionoj da metroj, 1 705-oble pli multe ol antaŭ 1949. En tiu periodo oni malkovris sume 162 mineralojn kaj konis rezervokvanton de 148 el ili, inter kiuj pli ol 20 okupas antaŭajn lokojn en la mondo laŭ rezervokvanto.

● Ĉiujare en la komenca periodo de la 50-aj jaroj Ĉinio produktis 10 000 biciklojn. Kaj nun la jara produktokvanto kreskis 4 000-oble. En Ĉinio ĉiu tria loĝanto posedas unu biciklon. Tial Ĉinio meritas la nomon "Lando de bicikloj".

● En la 40 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la forstumitaj arboj, escepte de la arbidoj plantitaj en la pasintaj jaroj, jam formis arbarojn kun areo de 460 milionoj da muoj (1 muo = 1/15 hektaro), kiu okupas la unuan lokon en la mondo.

● La Scienca Urbo en la okcidenta parto de Pekino estas fama pro multeco de talentuloj kaj sinsekvanta apero de scienc-teknikaj fruktoj, kiaj artefarita bov-insulino kaj granda komputilo "Lakta Vojo" kun monda nivelo.

● Ĉinio sukcese lanĉis sume 25 artefaritajn satelitojn kaj transportajn raketojn "Ŝtormo n-ro 1" kaj "Longa Marŝo n-roj 1-4".

● Ĝis nun Ĉinio starigis pli ol 50 pontojn super la Flava Rivero, ĝia dua granda rivero. Ĉiu 100-kilometra riverparto havas unu ponton. Al ili mankas neniu formo de ponto en la mondo.

● En Ĉinio ĉiutage eldoniĝas meznombre pli ol 100 specoj da libroj. Antaŭ dek jaroj Ĉinio havis nur 100 eldonejojn, kaj nun pli ol 500.

● De la 70-aj jaroj, kiam Ĉinio

ekpraktikis landskalan naskolimiĝon, ĝis nun, la nombro de naskitoj tra la lando reduktiĝis je 200 milionoj kaj ŝpariĝis 3 000 miliardoj da juanoj da vartkosto.

● Septembre de 1989 en Pekino okazis la 15-a Azia Vira Korbopilka Ĉampioneca Konkurso. La ĉina teamo gajnis la ĉampionecon kaj la sud-korea la subĉampionecon. Ĉinio jam sepafoje gajnis la azian ĉampionecon.

● Fakuloj de la Agronomia kaj Forstokultura Akademio de Qinghai, Ĉinio, sukcesis en grandarea kulturado de legomoj ĉe la fonto de Yangzi-rivero kun altitudo de 3 700 metroj kaj per tio rompis la rekordon de 3 200 metroj, kiun kreis Usono tiuflanke.

● Pentristo Tian Rulong de Hunan, Ĉinio, pentras sen uzi papecon kaj penikon. Li verŝas iom da inko sur vitroplaton 0.67-kvadratmetran kaj blovas sur la inkon. Post momento aperas sur la plato impona kaj koline agrabla pejzaĝo. En la pasintaj jaroj li kreis ĉ. cent tiajn verkojn kaj eksponis ilin en Japanio.

● Antaŭ nelonge en Pekino estis malfermitaj al turistoj antikvaj konstruaĵoj, inkl. de Zhengyang-pordego, unu el la naŭ



En la 15-a Azia Vira Korbopilka Ĉampioneca Konkurso

pordegoj de Pekino en Mingdinastio (1368-1644), kaj ĝia turo kun embrazuroj.

● En Yunnan-provinco de Ĉinio estas trovita fosilio de malgranda urso. Ĝiaj dentoj strukture similas kaj al tiuj de pando kaj al tiuj de praurso. Ĝi vivis antaŭ 8.2 milionoj da jaroj kaj estas konata kiel la plej frua pando de la mondo. Esplorinte milon da fosilioj de pandoj, ĉinaj fakuloj konstatis, ke praurso estas la prapatro de

Sceno el la rakonta filmo "Soleno de la fondiĝo de la nova Ĉinio" premiita kiel bona filmo en la Ĉina Filmo-festivalo en 1989





La harplena knabino

pando.

● Lastatempe oni trovis harplenan knabinon en montregiono de suda Gansu-provinco, Ĉinio. Ŝi estas la unua tia knabino trovita en Ĉinio.

● De la 21-a ĝis la 27-a de septembro 1989 en Pekino okazis la Unua Filmo-festivalo de Ĉinio. Partoprenis en ĝi 40 filmoj. Dum la festivalo oni aranĝis simpozion kaj kunsidon pri novaj filmoj. "Chuntao" kaj aliaj kvin filmoj gajnis premion de elstara filmo de 1988. La ĉina filmo-festivalo okazas ĉiun duan jaron kaj iom post iom fariĝos grandioza, kun internacia koloro.

● Memore al la 2540-a datreveno de la naskiĝo de Konfuceo, granda pensulo, edukisto kaj politikisto de la antikva Ĉinio, la Ĉina Fonduso de Konfuceo kaj Unesko kune okazigis simpozion en Pekino la 7-an de la lasta oktobro. Centoj da fakuloj de Ĉinio kaj aliaj 25 landoj kaj regionoj donis siajn opiniojn, traktante la temon "La historia pozicio de konfuceanismo kaj ĝia influo sur la nuntempa socio". Antaŭ tio, ankaŭ en Qufu, Shandong-provinco, la naskiĝloko de Konfuceo, okazis granda memorfesto en antikva stilo.

FONDAĴO IVO LAPENNA

Celo: Subvenciadi el la interezoj de la kapitalo publikaĵojn konformajn al humaneca internaciismo kaj aktiva neŭtraleco — la linio de Ivo Lapenna kaj L.L. Zamenhof.

La Estraro elektita en Graz 1987:

Prezidanto: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio;

Vicprezidanto: S-ino Birthe Lapenna, 77, Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF Middlesex, Britio;

Vicprezidanto: S-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio;

Sekretario-kasisto: S-ro Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio.

Ĉiujn kontribuojn bv. sendi al unu el la estraranoj aŭ prefere al la sekretario-kasisto, pĉk. København 1 19 06 01.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

DOKUMENTOJ KAJ MATERIALOJ PRI LA KONTRAŬNEŬTRALECA POLITIKA KONSPIRO EN UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



DE
IVO LAPENNA

komitatano kaj estrarano de UEA 1938-1974, ĝenerala sekretario 1954-1964, prezidanto 1964-1974, Honora Membro ĝis la puĉo de 1974, rifuzinto de proponita Honora Prezidenteco de UEA en 1974

PLI AKTUALA OL IAM ANTAŬE

LA CELO ESTAS DISKONIGI LA VERON

"Mi devas diri ke, leginte la detalojn en ĉi tiu libro, mi skuiĝis pro la graveco de la situacio". — H.A. de Hoog en 'Dia Regno'.

LA PLEJ GRAVA SOCI-POLITIKA VERKO DE LA ESPERANTO-LITERATURO

Aĉetebla ĉe Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio
Ĝirkonto: 1 19 06 01. Prezo: 150 d.kr. plus sendokostoj.

Kontribuu por la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj"

"Fotoj Faritaj de E-istoj" en nia gazeto estas rubriko destinita por publikigo de fotoj faritaj de niaj legantoj. Por tiu rubriko ĉiam fervore kunlaboras kun ni la legantoj. Ili sendis al ni multe da fotoj, kaj granda parto el ili estis aperigita en la rubriko.

Por ke nia rubriko estu pli ĉarma, ni esperas pli da fotoj kaj lumbildoj pri la popola vivo, moro, pejzaĝo kaj Esperanta movado de ĉiuj anguloj de la mondo.

La sendintojn de la fotoj, kiuj estos aperigitaj en nia gazeto, ni rekompencos per malgranda donaco — ĉina Esperanta libro. Cetere, en jarfino, nia redakcio sendos donacon en ĉina gusto al la sendintoj de la plej bonaj fotoj.

— La Red.

Feng Menglong, Ling Mengchu kaj prospero de noveloj en Ming-dinastio

de MEI ZHI

EN la periodo de la dinastioj Song (960-1279) kaj Yuan (1279-1368) furoris rakontado de historioj fare de popolaj artistoj. La manuskriptoj de tiuj historioj nomiĝis tekstoj de rakontoj. Ili estas buŝa literaturo kaj ankaŭ novelo. En Ming-dinastio ili estis atentataj de literaturistoj, kiuj faris al tiuj tekstoj redaktadon kaj reverkadon, imitante ilian originalan formon. Tiam aperis granda nombro da noveloj similaj al la tekstoj kaj tiel prosperiĝis la noveloj.

Feng Menglong (1574-1646) estis verkisto, kiu frue kolektis, poluris kaj redaktis la manuskriptojn kaj ankaŭ verkis novelojn imitante ilin. Li kompilis tri novelarojn "Parabola Novelaro", "Averta Novelaro" kaj "Admona Novelaro". Post Feng Menglong, Ling Mengchu verkis du novelarojn "Unua Kolekto de Mirindaj Okazaĵoj" kaj "Dua Kolekto de Mirindaj Okazaĵoj". La kvin novelaroj reprezentis la ĉefan atingon de la noveloj en Ming-dinastio kaj havis grandan influon sur la tiama kaj posta literaturo.

Feng Menglong montris literaturan talenton jam en sia juna aĝo kaj kondutis senskrupule. Post kiam entrudiĝis la armeo de Qing-regno internen de Shanhaiguan-pasejo li verkis por montri sian zorgon pri la sorto de la ŝtato kaj mortis de indigno pro la pereado de Ming-dinastio. Li faris kolektadon, reordigon kaj redaktadon pri la populara literaturo dum sia tuta vivo. Li kolektis, reviziis kaj eldonis multajn novelojn, dramojn, popolajn kantojn kaj aliajn popularajn literaturajn verkojn. Li okupiĝis ankaŭ pri verkado, sed la nombro de liaj verkoj estis malfacile kalkulebla.

La tri novelaroj kompilitaj kaj reviziitaj de Feng Menglong havas 120 novelojn. El ili pli ol 70 noveloj estis liaj verkoj, imite tekstojn de rakontoj. Enhave ili koncernas multajn aferojn. Inter ili troviĝas noveloj, kiuj prezentas fidelan amon de gejunuloj kaj ilian aspiron al geedziĝa libero, aliaj montras, kiel metiistoj kaj etkomercistoj subtaksas riĉaĵon kaj amas justecon, triaj bildigas persekutadon de burokratoj al senkulpaj popolanoj, tiranadon kaj senskrupulan krimadon de bienuloj. Tiuj verkoj spegulas la epokan trajton de kadukiĝo de la feŭda bienularo kaj leviĝo

de la urbana socitavolo kaj la spiritan fizionomion de diversaj personoj en tiu epoko.

La novelo "Ole-vendisto kaj Belulino" bildigas, kiel malriĉa urbano venkis la rutinan socian koncepton en amo kaj geedziĝo per sia sincereco kaj konkeris la koron de belulino. Ĝia heroino Shen Yaoqin (Ŝen Jaŭĉin) estis tre bela junulino, kiu disiĝis de siaj gepatroj en milita ĥaoso kaj malfeliĉe fariĝis putino. La ole-kolportisto Qin Zhong (Ĉin Ĝong) zorgeme traktis la junulinon, respektis ŝian personecon kaj tiel gajnis ŝian amon kaj fine edziĝis al ŝi. En la unuafoja renkontiĝo ŝi ne amis lin kaj pensis en si: "Malofte vidiĝas tia bonkora kaj honesta junulo, zorgema kaj



Portreto de Feng Menglong

komplezema... Eĉ el mil viroj, oni ne trovas unu tian junulon. Bedaŭrinde li estas etkomercisto. Se li estus monduma junulo, mi edziniĝus al li volonte.” Sed kiam ŝi estis molestita de monduma junulo, ŝi ekkonsciis, ke Qin Zhong estas aminda kaj decidis edziniĝi al li. La heroo Qin Zhong estis etkomercisto, li ne povis konkeri la koron de belulino per socia pozicio kaj mono, en tio povis sukcesigi lin nur sincera amo. Tiele la novelo montris la originalan trajton de urbanoj en la amafero.

“Perfidita Prostituitino Du Shiniang kaj Ŝia Trezorujo” estas la plej eminenta verko el la tri novelaroj kaj ankaŭ brila perlo el la noveloj imitantaj tekstojn de rakontoj de Ming-dinastio. La heroino Du Shiniang estis sukcese priskribita figuro. Ŝi, fama prostituitino en la ĉefurbo, kaj nobelido Li Jia (Li Ĝja) enamiĝis unu en la alian. La bela prostituitino faris malfacilan batalon kontraŭ la monavida bordelistino kaj fine forlasis la bordelon dank’ al sia saĝo kaj persistemo. En ŝipveturo al sia hejmo, la monavida edzo Li Jia vendis ŝin al riĉa komercisto Sun Fu. Du Shiniang en senlima malĝojo kaj indigno forte riproĉis la perfidulon kaj sin ĵetis kun kesto plena de grandvaloraj juveloj en torentan riveron. Tiu bonkora kaj firmdecida virino per sia vivo akuzis la kriman feŭdan socion.

“Wu Bao’an (U Baŭ’an) Forlasis Sian Hejmon por Savi Amikon” kaj “Shi Runze (Ŝi Ĵunze) Renkontas Amikon en Tanque (Tanĉjue)” estas verkoj priskribantaj ordinarajn homojn, kiuj preferas amikecon al profito. La antaŭa priskribas: Wu Bao’an kaj Guo Xiang (Gŭo Ŝjang) amikiĝis. Poste Guo estis forkaptita de sudaj lokanoj en milito. Por savi lin Wu forlasis sian hejmon, faris 10-jaran klopodon, spertis ĉiajn malfacilojn kaj fine elsavis la amikon. Tia sincera kaj sindonema amikeco estis malofte vidita en la socio plena de artifiko. La posta novelo rakontas: Shi Runze, kiu okupiĝis pri silka teksado, survoje de silkaj-vendo trovis 6.2 taelojn da arĝento. Li estis tre ĝoja kaj kalkulis en si: “Mi aĉetos plian teksilon per la arĝento, tial ĉiumonate mi teksos pli multan silkajon kaj akiros pli da mono. Kaj mi fariĝos riĉulo post sep jaroj.” Sed li subite ŝanĝis la penson: “Se la arĝento estas perdita de riĉulo, ĝi estas tute ne grava por li, kvazaŭ bovo perdus unu haron, kaj mi sendube aĉetos ion per ĝi... Se la perdinto estas etkomercisto kaj havas nur tiom da kapitalo aŭ sin vivtenas kiel mi... La arĝento do estas lia sola vivrimedo. Ĝia perdiĝo signifas ĉeson de la spiro...” Tiel pensante, li decidis redoni la arĝenton al la perdinto. La perdinto Zhu En (Ĝu En) vere estis metiisto de silkajoteksado. Li multe dankis Shi Runze. Poste, kiam li informiĝis, ke al Shi mankas morusfolioj por nutri la silkraŭpojn, li donacis al Shi grandan kvanton da morusfolioj kaj per tio ebligis al Shi eskapi el bankroto. Tiuj priskriboj pri amikeco inter etmetiistoj estis tute novaj en la tiamaj literaturaj verkoj.

En la arto de verkado la tri novelaroj portas trajtojn de popola rakont-kanta literaturo. Iliaj struk-

turo estas kompleta kaj klara, intrigoj komplikaj, lingvo populara, simpla kaj viva, elspiranta fortan popolan spiron. Ili priskribas psikan aktivadon de la personoj pli detale kaj pli delikate ol la popolaj rakont-kantaj literaturaj verkoj, sekve de tio la karakteroj de la personoj en la tri novelaroj estas pli elstaraj. Ekz., la novelo “Jiang Xingge (Ĝjang Ŝingge) Retrovis la Perlo-veston” havas tre delikatan priskribon pri la animstato de komercisto Jiang Xingge post kiam li informiĝis, ke lia edzino amas alian viron. Jen: “Jiang paliĝis de kolero kaj povis diri eĉ nenion... Li disŝiris ŝian leteron kaj ĵetis ĝin en riveron...” Subite li ekpensis: “Kiel feliĉe vivis la geedzoj antaŭe. Ĉar mi avidis nur profiton kaj forlasis ŝin en ŝia juneco, ke ŝi vivis sola, kaj sekve de tio estiĝis la malhonoraĵo. Kiel mi bedaŭras nun pri la okazintaĵo!” Tio vivece montris la profundan amon de Jiang Xingge al la edzino kaj lian korsziran doloron pro perdo de ŝi. Per tio la verko vidigis la bonkoran kaj modestan karakteron de tiu juna komercisto.

Nemalmultaj verkoj el la tri novelaroj miksiĝis kun fatalismaj kaj pornografiaj priskriboj. Tio certgrade difektis la edifan karakteron kaj artan nivelon de la verkoj.

La “Unua Kolekto de Mirindaj Okazaĵoj” kaj “Dua Kolekto de Mirindaj Okazaĵoj” entenas 78 novelojn entute. Ilia kompilinto Ling Mengchu (1580-1644) iam funkciis kiel ŝtata oficisto. Li oponis kontraŭ kamparana ribelo kaj pro tio mortis de sango-sputo. Influate de Feng Menglong, li kompilis la du novelarojn. Ĉar li estis ne tre serioza en la verkado kaj pasiva en la ideologio, lia sukceso en la du novelaroj estis multe malpli granda ol tiu de la tri novelaroj de Feng Menglong.

La du novelaroj de Ling Mengchu ĉefe spegulas la vivon kaj ideologion de urbanoj. Iliaj verkoj pri komercistoj estas aparte belaj. La novelo “Feliĉulo Profitegis de Vendo de Mandarinaj” bildigas transmaran komercadon. La heroo Wen Ruoxu (Ŭen Ĵuoŝju) malsukcesis en enlanda komercado kaj bankrotis. Hazarde li veturis trans maron per ŝipo de riskemaj komercistoj. Li portis tiam kun si kvanton da mandarinaj, kiuj kostis nur unu taelon da arĝento enlande, sed li vendis la fruktojn kontraŭ pli ol 800 taeloj da arĝento transmare kaj trovis perlojn. Dank’ al tio li subite fariĝis granda riĉulo kaj starigis sian domon en marborda loko. La verko montris la deziron de komercistoj en la feŭda socio pri transmara aventuro. Estas similaj verkoj en la novelaroj de Ling Mengchu, kiaj “Komercisto Cheng Riĉiĝis en Plurfoja Akaparo” kaj “Rabisto Wu Riĉe Rekompencas pro Unu Manĝo”. La antaŭa priskribas akaparon de komercistoj. La lasta priskribas, kiel kolportiston trafis tri raboj kaj lia onklino admonis, ke li ne forlasu sian heredon okupon pro la malsukcesoj. Tiuj verkoj havas komunan trajton prezenti la psikon strebi al profitego kaj riĉiĝo. Tio multe diferencas de la novelaroj de Feng Menglong, kies herooj prosperigas la aferon per sia diligenta laboro. ■

Perfidita prostituitino Du Shiniang kaj ŝia trezorujo

(mallongigita)

DU Shiniang, deflorita en la aĝo de 13 jaroj, jam atingis la aĝon de 19 jaroj. Dum tiuj sep jaroj ŝi akceptis sennombrajn sinjoridojn kaj junajn nobelojn. Ili ĉiuj volontis fordiboĉi sian monon fascinite de ŝia beleco.

En Pekino studis juna kaj bela sinjorido Li Jia. Antaŭe li neniam kontaktiĝis kun bela virino. Post konatiĝo kun Du Shiniang, li estis tute ekster si de ĝojo kaj tutkore enamiĝis en ŝin. Ankaŭ Du Shiniang amis lin, belan, komplezan kaj malavaran. Ĉar la bordelistino estis monavida kaj malica, Du Shiniang delonge intencis forlasi la bordelon kaj sin edzinigi. Ŝi ŝatis la honestecon kaj sincerecon de sinjorido Li Jia kaj aspiris pri edziniĝo al li. Sed Li Jia sentis skrupulojn pro la severa patro kaj ne kuraĝis decidi pri la edziniĝo. Sed malgraŭ tio ili amis unu la alian, kunvivis kiel geedzoj kaj ĵuris fidelecon kaj eternan amon.

Dum longa tempo Du Shiniang akceptis Li Jia solan kaj rifuzis ĉiujn aliajn klientojn, ĉu ili estas riĉegaj ĉu plutokrataj. Li Jia pagis malavare kaj la bordelistino servile kajolis lin. La geamantoj vivis kune ĉirkaŭ unu jaron en lukso. Sed poste iom post iom vidiĝis la fundo de la monujo de Li Jia, kaj la bordelistino traktis lin malĝentile. Ŝi plurfoje instigis Shiniang rifuzi Li Jia, sed tiu ĉi malkonsentis. La bordelistino intence ofendis sinjoridon Li, por ke li mem foriru pro ŝokiĝo. Sed sinjorido Li estis fraŭlo, bonhumora kaj humila, tial la bordelistino ne sukcesis en sia ruzaĵo. Ŝi do verŝis sian malkontenton sur Shiniang:

“Alies filinoj (Bordelistinoj kutime nomis la prostituitinojn filinoj — *La trad.*) estas fonto de mono, sed en mia hejmo mi devas vivteni por vi la almozulon. De kie mi akiru la monon? Diru al la almozulo: se li donos al mi kelkajn taelojn da arĝento, vi povos kunvivi kun li, kaj per la mono mi aĉetos alian knabinon.”

“Panjo, ĉu vi ne ŝercas?”

La bordelistino bone sciis, ke Li Jia jam havis neniun groŝon kaj eĉ la vestojn jam lombardis. Ŝi opiniis, ke Li Jia ne povos pretigi la monon, tial ŝi senpripense respondis al Du Shiniang:

“Mi neniam mensogas. Tion mi promesas.”

“Panjo, kiom da mono vi deziras?”

“Al aliuloj mi pagigos certe 1 000 taelojn da arĝento. Sed al tiu mizera neniohavanto nur 300 taelojn sub la premiso, ke li pagos en 3 tagoj. Se li ne povos tion plenumi en la 3 tagoj, mi forpelos lin malgraŭ tio, ĉu li estas sinjorido aŭ ne.”

“La sinjorido portempe havas embarason de mono, sed mi kredas, ke li sukcesos kolekti la 300 taelojn da arĝento. Sed la dato estas tro proksima, bonvolu prok-

rasti ĝin ĝis dek tagoj.”

Konsiderante, ke la sinjorido ne povas kolekti tiom multe da mono eĉ en cent tagoj, la bordelistino konsentis kun Du Shiniang:

“Bone, pro via afableco mi prenos la dekan tagon kiel la limdaton. Se en tiu tago li ankoraŭ ne povos pagi, ne kulpigu min.”

Du Shiniang prenis sian ŝparitan monon kaj Li Jia prunteprenis la ceteran sumon. Fine ili sukcesis kolekti la postulatan sumon.

En la deka tago la bordelistino venis al Shiniang kaj diris: “Mia filino, hodiaŭ estas la deka tago.”

Ŝin enlasis Li Jia. “Koran dankon pro via afableco. Mi ja estas preta inviti vin.” Ĉe la diro Li Jia metis sur la tablon 300 taelojn da arĝento.

La bordelistino ne atendis, ke Li Jia sukcesis kolekti antaŭ la limdato la pagendan sumon da mono. Ŝi, mirigite, mienis bedaŭre. Du Shiniang tuj rompis la silenton:

“En la pasintaj jaroj mi gajnis por vi almenaŭ milojn da taeloj da arĝento. Ja persone vi promesis al mi la edziniĝon, kaj la pago de 300 taeloj da arĝento nun estas preta kaj plenumita antaŭ la limdato. Se vi perfidos la promeson kaj sinjorido Li foriros kun la mono, mi tuj memmortigos. Tiam vi perdos kaj la monon kaj la homon, dum restos por vi nur eterna bedaŭro.”

Post longa konsidero la bordelistino pesis la arĝenton kaj diris:

“Mi scias, ke mi jam ne povas plu reteni vin. Se vi decidis, do iru for tuj! Sed tamen vi restigu ĉiujn vestojn kaj ornamaĵojn.” Tion dirinte la bordelistino puŝis ilin el la ĉambro kaj ŝlosis la pordon.

Estis septembra tago. Du Shiniang ellitiĝis nur antaŭ kelkaj minutoj kaj ne trovis tempon por sia tualetto. Ŝi riverencis dufoje al la bordelistino kaj ankaŭ sinjorido Li ŝin adiaŭis. La geamantoj fine sukcesis foriri de la bordelo.

Li Jia ŝipveturis hejmen kune kun Du Shiniang. Survoje Li Jia konatiĝis kun veturanto en najbara ŝipo. Iun tagon Li Jia estis invitita en la najbaran ŝipon, dum Shiniang pretigis vinon kaj almanĝaĵojn por Li Jia. Sed li gastis tutan tagon en la najbara ŝipo, kaj Shiniang atendis lin sub lampo. Li Jia revenis en la vespero, kaj Shiniang leviĝis kun ĝojo. Sed Li Jia mienis malgaje. Ŝi prezentis al li plentason da varma vino, sed Li Jia skuis la kapon kaj senparole kuŝiĝis en la lito. En malagrablaĉo Shiniang formetis la manĝilaron kaj helpis lin senvestiĝi.

“Kio vin tiom ĉagrenis hodiaŭ?”

Li Jia nur suspiris malgraŭ plurfo-
ja demando de Shiniang kaj endormi-
gis. En konfuziĝo Shiniang sendor-
miĝis. Ŝi sidis ĉe la litokapo ĝis nok-
tomezo, kiam sinjorido Li vekigis en
veo.

“Kial vi veadas? Kiu problemo
neeldirebla vin trafis?”

Sinjorido Li leviĝis kaj sidis en
litkovrilo. Li plurfoje malsukcesis ek-
paroli kaj larmis. Shiniang brakumis
lin kaj konsolis karese:

“Ni enamiĝis jam antaŭ du jaroj.
La hodiaŭan feliĉon ni akiris ven-
kinte sennombrajn malfacilojn. Dum
la longa veturado vi neniam montris
malgajecon. Sed kial nun, kiam ni baldaŭ atingos la
hejmon, vi estas tiel afliktita? Kio okazis? Ni estas jam
geedzoj dividantaj kune kaj feliĉon kaj malfeliĉon. Ni
certe povos solvi la problemon, kaj vi ne devas kaŝi la
aferon”

Ripetade pridemandite, sinjorido Li larme malkaŝis la
aferon:

“Mi estis migranta mizerulo savita de vi. Vi degnis
promesi vin al mi, kion mi rigardas nerekompencebila
favoro. Sed mi konsideris kaj konsideradis, ke mia pa-
tro, altranga ŝtatoficisto, estas rigore pedanta. Mi timas,
ke li koleriĝos kontraŭ mi pro vi kaj elpelos min. Do ĝis
kiam ni migros? Ni ne povos teni la feliĉan geedzecon,
kaj la patro rompos rilatojn kun mi. Hodiaŭ mi kaj mia
nova amiko Sun Fu de Xin-an interkonsiliĝis dum drin-
kado, kaj de tio mi korŝiriĝis.”

“Kiel vi decidis?” Shiniang demandis en forta surpri-
ziĝo.

“Homo ekster komplikaĵo vidas pli klare. Amiko Sun
proponis al mi racian konsilon, sed mi timas, ke vi ne
aprobos.”

“Kio estas via amiko Sun? Kial mi ne aprobos, se lia
konsilo estas prudenta?”

“Mia amiko Sun Fu estas komercisto de salo, juna kaj
distingiĝa. Hieraŭ li aŭdis vian kantadon kaj demandis
min pri vi. Mi diris al li vian devenon kaj ankaŭ miajn
skrupulojn pro nia geedziĝo. Li intencis edziĝi al vi
kontraŭ mil taeloj da arĝento. Tiele mi akiros la arĝen-
ton kaj pro tio mi povos kunvivi kun miaj gepatroj, kaj
vi havos ankoraŭ edzon. Sed mi domaĝas disiĝon de vi.”
Ĉe la diro larmoj verŝiĝis kiel pluvo el liaj okuloj.


Shiniang demetis siajn brakojn kaj diris kun sardona
rido:

“La ulo, kiu faris por vi la konsilon, estas perfekta
heroo. Vi povos kaj reakiri mil taelojn da arĝento kaj
vojaĝi senŝarĝe, post kiam mi apartenos al aliulo. Vere
saĝa ideo konvena al la moroj kaj reguloj. Kie estas la
arĝento?”

La sinjorido ĉesis plori kaj diris:

“Mi ne prenis la arĝenton, ĉar mi ne akiris vian
permeson.”

“Konsentu kun li tuj morgaŭ matene. Vi neniel devas



preterlasi la bonŝancon. Mil taeloj da arĝento estas
granda sumo, kaj mi devas foriri post transdono de la
arĝento. Ni devas gardi nin kontraŭ eventuala trompo
de ĉi fikomercisto.”

Ĉirkaŭ la dua horo nokte Shiniang komencis tualeton
sub lampo. “La hodiaŭa tualetto portas neordinaran sen-
con, kaj por la nova mastro kaj por adiaŭo al la malno-
va.” La rafinita tualetto el valoraj kosmetikaĵoj kaj freŝ-
koloraj galanterioj faris ŝin pli ĉarma. La tualetto finiĝis
ĉe la tagiĝo.

Sun Fu alsendis servoknabon por peti respondon.
Shiniang rigardis sinjoridon Li kaj rimarkis lian ĝojan
mienon. Ŝi urĝis lin respondi al Sun kaj preni la monon.
Sinjorido Li iris sur la ŝipon de Sun kaj informis lin pri
la decido. Sun diris:

“La arĝenton mi certe donos al vi, sed antaŭ tio mi
devas peti la tualetujon de la ĉarmulino kiel signon de
konsento.”

Sinjorido Li transdiris tion al Shiniang kaj ŝi diris
montrante la tualetujon kun ora desegno: “Jen mia
tualetujo.” Sun Fu ekstaziĝis de tio kaj tuj sendis en la
ŝipon de Li Jia mil taelojn da arĝento. Shiniang ekza-
menis la purecon kaj la pezon de la arĝento. Post certiĝo
ŝi mansignis al Sun Fu, kaj tiu raviĝis je la vido. Shi-
niang diris al Sun Fu:

“Bonvolu reporti al mi la tualetujon, ĉar en ĝi kon-
serviĝas paspermeso de sinjorido Li kaj mi devas doni
tiun al li.”

Konsiderante, ke Shiniang jam fariĝis lia proprajo,
Sun Fu tuj ordonis servoknabon reporti la tualetujon
sur la ferdekon de la ŝipo de Li Jia.

Shiniang malŝlosis la tualetujon. En ĝi estis kelke da
tirkesto. Shiniang petis sinjoridon Li eltiri la unuan
keston: La kesto estas plene okupita de diversaj juveloj,
kiuj valoras centojn da taeloj da arĝento. Shiniang ĵetis
la keston en la riveron, kio forte mirigis Li Jia, Sun Fu
kaj la kunvojaĝantojn en la du ŝipoj.

Shiniang ordonis Li Jia eltiri la duan tirkeston: En ĝi
estas muzikiloj el jado kaj oro. En la tria kesto estas
multe da valoregaj luksaĵetoj el jado kaj purega oro, en
valoro de miloj da taeloj da arĝento. Ankaŭ tiujn trezo-
rojn ŝi ĵetis en la riveron. Tiam ambaŭborde kolektiĝis
multe da homoj. Ĉiuj kriis domaĝe: “Bedaŭrinde! Ho,

Plej bona kuracilo por la kronprinco

ANTAŬ multe da jaroj estis reĝo, kiu havis junan kronprincon. La junulo, kadavre pala kaj malsana, ĉiam kuŝis en la lito. La kortegaj kuracistoj multe klopdis, sed neniu el ili sukcesis resanigi lin. La reĝo forte ĉagreniĝis kaj anoncis al la tuta lando por peti efikan kuracilon por la kronprinco.

En malpli ol unu jaro la kronprinco prenis ĉiajn medikamentojn valoregajn, sed tio ne helpis.

Iun tagon venis al la palaco dika bonzo, kiu asertis, ke li povos resanigi la kronprincon. Tre ĝojis la reĝo kaj demandis lin, kiujn medikamentojn li enskribos en sian recepton.

La bonzo diris al la reĝo: "Kvin kilometrojn sudoriente de la palaco estas fea monto, kiu altas 300 metrojn. Longa vojeto kondukas al ĝia supro, kie kreskas purpura magia fungo. Se lia kronprinca moŝto manĝos ĝin, li tuj resaniĝos."

La reĝo ekĝojis kaj sendis serĉi la fungon. Sed la bonzo haltigis

svingante la manon: "Via reĝa moŝto, la fungo estas propraĵo de feoj, kaj por akiri ĝin la princo devas mem iri tien. Neniu alia povas plenumi la laboron anstataŭ la kronprinco."

La reĝo nur povis konsenti kun la bonzo.

Frumatene de la sekvanta tago, apogate de gvardianoj, la kronprinco ekgrimpis la fean monton. En spirego li atingis la montosupron. Li rigardis ĉirkaŭen, sed vidis nenion, krom ŝtonoj kaj arboj. En kolerego la reĝo ordonis aresti la bonzon.

"Ho jes, mi kulpis," la bonzo klarigis kun rideto. "Mi diris tro simple. Se lia kronprinca moŝto ne trovis la fungon, li iru duafoje, triafoje... Ĉiutage li devas grimpi la monton por serĉi la fungon. Li devas iri tien almenaŭ 50 fojojn, eĉ 100 aŭ 500 fojojn, ĉu en ventopluvo aŭ neĝo, ĉu en varmego aŭ mal-

varmego. Unuvorte, li neniom devas sin malstreĉi antaŭ akiro de la fungo."

"Se li ne sukcesos en du jaroj?" demandis la reĝo kun duba mieno.

"Dehaku al mi la kapon!" trankvile respondis la bonzo.

"Konsentite. Se la kronprinco sukcesos, mi rekompencos vin per sitelo da oro kaj ĉaro da silkaĵoj."

Tiel la kronprinco ĉiutage grimpis la monton en ĉia vetero. Pasis malpli ol tri monatoj, la kronprinco reakiris la apetiton kaj ruĝajn



pometojn sur la vangoj. Post pliaj monatoj tute resaniĝis la kronprinco.

Diru, karaj legantoj, kian kuracilon la kronprinco trovis? ■

bedaŭrinde!" Sed ili ne sciis, kio okazis. La lasta tirkesto estas malkovrita: En ĝi estas malpli granda kesto kun plenmano da brilegaj fajnaj perloj, gemoj el berilo kaj katokuloj ene. Ili estas raraj kaj malfacile troveblaj, kaj la valoro netaksebla. La rigardantoj estas fascinitaj de la trezoroj kaj leviĝis tondra rumoro. Shiniang estis ĵetonta ilin en la riveron. Li Jia ekpensis kaj ploregis ĉirkaŭprenante ŝin. Ankaŭ Sun Fu alvenis por admoni. Shiniang flankenpuŝis Li Jia kaj insultis Sun Fu:

"Mi kaj sinjorido Li trairis maron da malfaciloj por la hodiaŭa kuniĝo. Sed vi, lasciva klaĉulo, subfosis nian edzecon kaj detruis mian amon. Vi ja estas mia malamiko. En la transmondo mi certe akuzos vin al la dio. Ne revu pri edziĝo al mi." Post tio ŝi turnis sin al Li Jia:

"Dum tiuj jaroj mi akumulis kelke da mono por la vivo en la estonteco. Kiam ni konatiĝis, ni ja ĵuris pri eterna amo. Ĉe la forlaso de Pekino, miaj amikinoj, sub preteksto de donaco, redonis al mi la deponitajn trezorojn, kiuj valoras ne malpli ol dekmil taelojn da arĝento.

Mi pensis, ke vi reiros hejmen kun la mono, kaj tiam viaj gepatroj vidos mian sincerecon kaj akceptos min kiel bofilinon. Se tiel, mi estos kontenta kaj dankema pro la certiĝo pri la garantiata estonteco de mia vivo. Sed ekster mia atendo, vi estas tro ŝanceliĝema, facile kredis klaĉon, forlasis min duonvoje, perfidante mian fidelecon. Nun antaŭ la publiko mi malfermis la tualetujojn kaj montris la trezorojn sole por pruvi al vi, ke miloj da taeloj da arĝento ne estas granda sumo por mi. Mi bedaŭras, ke en mia tualetujo estas juveloj, sed en viaj okuloj ne pupiloj. Ho ve, kia sorto trafis min. Apenaŭ forskuinte la fiokupon, mi estas perfidita. Nun ĉiuj ĉeestantoj povas atesti por mi, ke ne mi perfidis vin, sed vi perfidis min."

La apudstarantoj ĉiuj ekploris kaj riproĉis la perfidon de sinjorido Li. En honto kaj bedaŭro sinjorido Li profunde pentis kaj ploris. Li volis peti indulgon de Shiniang, sed ŝi saltis en la riveron kun la trezorujo. Oni, forte mirigite, volis ŝin savi, sed la ondanta torento jam englutis ŝin... ■

“VARMA TERO” POR INVESTANTOJ

Teksto kaj fotoj de DA WEI

VETURINTE 50 minutojn per aŭto el la urbo Tianjin sudorienten laŭ ebena kaj larĝa ŝoseo, mi atingis Tanggu.

Tanggu kun ĉ. 400 000 loĝantoj estas apudmara regiono de la antaŭurbo de Tianjin. Nordoriente de ĝi kuŝas senlima sala tero. En la lastaj jaroj tiu dezerta loko subite vigliĝis. Tien venis aro post aro da entreprenistoj kaj komercistoj en-kaj eksterlandaj. Sekve tie aperis rektaj vojoj, densaj tubaroj, kaj fabriksdomoj kaj oficejaj domoj en ekzotaj arkitekturaj stiloj. Kvankam ĉirkaŭe ankoraŭ vidiĝas dezerto, tamen mi jam vidis, ke vigla moderna produktado jam leviĝas. Tie estas la Tianjin-a Ekonomia kaj Teknologia Disvolvata Areo (TEDA).


Gvidantoj de la administra komisiono en laboro

TEDA, DIFERENCA DE LA SPECIALAJ EKONOMIAJ REGIONOJ

La menciita areo de 33 kvadrataj kilometroj fondita en la fino de 1984 estas najbara al Bohai-mar, proksima al Xingang-haveno de Tianjin kaj Tanggu, kaj havas tre oportunan transportadon akvan, teran kaj aeran. Mi informiĝis de la administra komisiono de la areo, ke en la jam konstruita industria regiono kun areo de 3 kvadrataj kilometroj, 160 entreprenoj kune investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj, kune administrataj de Ĉinio kaj aliaj landoj, aŭ funkciigataj sole per alilanda kapitalo, el 16 landoj kaj regionoj jam estas sankciitaj por konstrui, kun totala investo de

270 milionoj da usonaj dolaroj. El tiuj proksimume 100 entreprenoj jam ekfunkciis, la sumo de iliaj eksportitaj produktoj estas 50 milionoj da usonaj dolaroj. Krome tie konstruiĝis ankaŭ loĝdoma bloko de 1.2 kvadrataj kilometroj.

En la lastaj dek jaroj, praktikante sinmalferman politikon, Ĉinio trairis malfacilan vojon. Nun jam formiĝis nova konsisto el specialaj ekonomiaj regionoj, ekonomiaj kaj teknologiaj disvolvataj areoj kaj ĉemaraj malfermitaj urboj, el kiuj ekonomiaj kaj teknologiaj disvolvataj areoj okupas gravan lokon. Mi informiĝis en intervjuo, ke la speciala ekonomia regiono estis ekonomie postĝinta ĉemara loko de Ĉinio. Ĝi prosperiĝis dank' al la specialaj politikoj de la ŝtato. La ekonomiaj kaj teknologiaj disvolvataj areoj, utiligante relative fortan ekonomian kaj teknikan bazon de la apogita ĉemara havenurbo, rapidigas utiligon de fremda kapitalo kaj enkondukon de avangardaj teknologioj por akceli teknikan reformadon kaj progreson de la malnovaj urboj. TEDA estas unu el la 16 tiaspecaj areoj jam fonditaj en Ĉinio. En la lastaj 5 jaroj ĝi direktis grandan atenton al kunlaborado kun alilandaj komercistoj en produktado, alprenis serion da favoraj politikoj kaj per tio gajnis nemalmultajn investantojn. Nun en la areo unuapaŝe formiĝis al-ekstera industria strukturo kun entreprenoj de novaj konstrumaterialoj, fajnaj kemiaĵoj, tekstilaĵoj kaj elektronikaj instrumentoj kiel siaj subteniloj.




STREBI AL ALTA RENDIMENTO

El la kritikoj de eksterlandanoj pri la ĉina investa kaj komerca kondiĉoj la plej ĝenerala estas, ke ĉinoj aranĝas aferon en granda malrapideco. La ekzamena kaj sankcia rapideco fare de la areo por la intertraktitaj kontraktoj pli kaj malpli ŝanĝis ilian impreson.

En 1983 usona TS-korporacio traktis kun iu kompanio de Tianjin pri altateknika projekto. Pasis jam ĉ. unu jaro, la ĉina flanko ankoraŭ ne faris decidon. La usonaj delegitoj nur povis reiri hejmen. Post du jaroj la usona flanko denove menciis al la ĉina kolego la projekton. La maltrankvila ĉina kolego subite ekmemoris TEDA kaj tuj telefonis al ĝia ĝenerala kompanio. Ĝia direktoro Ye Disheng tuj respondis kun certigo: "Ni helpos solvi la problemon. Estos bonvena por ni, se ili faros la konstruon en nia areo."

Usona delegito tuj flugis al Ĉinio kaj vizitis direktoron Ye. Sed, informiĝinte pri manko de fabrikdomo en la areo, li ŝanceliĝis. Ye tuj venigis la ĉefinĝenieron de la projekta instituto. Li promesis doni skizojn la sekvantan tagon kaj finkonstrui fabrikdomon antaŭ la jarfino. Post kelkaj tagoj la kontrakto estis subskribita kaj sankciita. En la subskriba ceremonio de la kontrakto la usona delegito ĝoje diris: "Tia rapideco estas malofta internacie."

Kompreneble ne ĉiuj aferoj estis plenumitaj en tia rapideco. Tamen ĉe sia fondiĝo la administra komisiono de TEDA jam decidis krei altefikan rapidecon. Ĝi unuigis la ekzamenajn kaj sankciajn instituciojn pri industrio, komerco, imposto, banko, dogano, planado, kio multe faciligis al la investantoj. En la industria kaj komerca buroo ĝia estro Yan Zheng konigis al mi, ke por malmultigi organizojn, la buroo unuigis la ekzamenan, sankcian kaj licencan instituciojn. Tiel, investantoj povas ricevi entrepren-



Muntado de program-regataj telefonaj interŝanĝiloj en la Tianchi-a Telekomunika Korporacio

an licencan en ĉ. unu monato post peto. Antaŭ nelonge komercisto el Taiwan pri aŭta sekuriga rimeno telefonis de Tianjin al la buroo, dezirante fini la licencan formaladon en unu tago. La buroo tuj sendis sian delegiton al Tianjin por intertrakti. Realiĝis la deziro de la komercisto de Taiwan. Li ĝoje esprimis, ke li estonte daŭre investos por nova projekto en la areo.

"INVESTANTO ESTAS REĜO"

Ĉe la komenco de la establo de la areo, la administra komisiono difinis la principon "la investantoj perceptu oportunecon kaj gajnu profiton". Estas severe malpermesite kontraŭleĝe altigi prezojn de akvo kaj elektro kaj pagigi je fremda valuto. Poste ĝi elmetis la devizon "investanto estas reĝo". Tio montris, ke ĝi donis sufiĉan atenton al cirkonstancoj por investado. Por efike solvi malfacilojn de investantoj, oni fondis en la areo "Servocentron por Konstruado" zorgantan pri konstrueja akordigo, kontrolo kaj konsulto, kio frugis funkciigon kaj produktadon de entreprenoj.

La Entreprena Limigita Korporacio Dan-Hua kune administrata de Danlando kaj Ĉinio produktas biciklojn. La korporacio iam dronis en senelirejo pro malfacila ven-

do de produktaĵoj kaj bankroto de enlanda fabriko de la danlanda flanko. Informiĝinte pri tio, la komisiono penis trovi merkaton por ĝiaj produktaĵoj kaj samtempe instigis ĝin altigi la kvaliton. Nun la korporacio jam reviviĝis kaj eksportis 110 000 biciklojn en 1988.

En la lastaj jaroj la komisiono plene utiligis diversajn ŝancojn por rekomendi kaj vendi produktaĵojn de la entreprenoj de la areo, kaj faris diversaspecajn ekspoziciojn kaj kunvenojn de komerca intertraktado enlande kaj en Japanio, Aŭstralio, Britio kaj Hongkongo. Tio multe vigligis la vendadon de nemalmultaj fabrikoj.

Junie de 1986, post vizito al TEDA, la konsilanto pri komercaj aferoj de la usona ambasadorejo en Ĉinio s-ro George Lee skribis en la raporto al la Ŝtata Konsilantaro de Usono, ke la plej impresa trajto de TEDA estas, ke la administrantoj estas junaj kaj kleraj, ili ne intencas eltordi el alilandaj investantoj monon per altigo de pagoj por laboro, tero, konstruaĵoj, domoj k.a... Li konsilis, ke la usonanoj, kiuj volas investi en Ĉinio, vizitu TEDA.

Aŭguste de 1989 la usona MGM-korporacio kaj TEDA subskribis kontrakton, ke la korporacio luu parcelon de 5.3 kvadrataj kilometroj. Tio estas la plej granda fremda investaĵo en Tianjin. ■




La disvolva areo en konstruado

En eksponejo de la disvolva areo



Alilandaj fakuloj de la Jiatai-a Ceramik-industria Limigita Kompanio kontrolas produktaĵojn.



LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (8)

Ĉe Jinsha-rivero

Teksto de **WANG QINGHUA** kaj **XU YE**
Fotoj de **XU JINYAN**

Jinsha-rivero



FORLASINTE Pingba de Xichang (Ŝjiĉang), la Suda Silka Vojo sin direktas suden laŭ Anning-rivero, preterpasas la antikvajn urbojn Dechang kaj Huili, etendiĝas laŭ montoj, interkruciĝas kun Jinsha(Ĝinŝa)-rivero kaj venas al Yunnan-provinco.

LA ANTIKVA URBO DECHANG

La nomo Dechang signifas prosperon. La sonoril-turo, kiu servis kiel vojmontrilo por poŝtstacio, estas la centro de la urbo. Du ĉefaj komercaj stratoj ekde la turo etendiĝas suden kaj norden. En 1887 la turo estis riparita. La ideografiaĵoj sur ĝiaj suda kaj norda elpendaĵoj estas malklare videblaj. Sur la komercaj stratoj funkcias restoracioj, fotejoj, gastejoj, bilardejoj, frizejoj, forĝejoj kaj diversaj butikoj. Ambaŭflanke de la stratoj montriĝas lokaj produktaĵoj kaj modaj vestoj. Sur la stratoj moviĝas fluoj da homoj. Tio multe vigligas la urbon.

Je pli ol 20 km. for de Dechang estas la Jinsha-a Lisu-nacieca Distrikto kun pli ol 2 300 loĝantoj, kies plejparto portas han-naciecajn

familiajn nomojn kaj parolas hanlingvon, tamen ankoraŭ konservas siajn naciecajn morojn kaj kutimojn. La lisu-aj virinoj portas broditan jaketon kaj tuboforman jupon kaj sin ornamas per ruĝaj bidoj, koraloj kaj konkajoj; kaj la viroj portas han-naciecan kostumon. Iu maljunulino entuziasme invitis nin en sian hejmon. Ŝi, malkaŝema, senĝene interparolis kun ni en ne flua han-lingvo. Ŝi diris: "En tiuj ĉi tagoj vilaĝanoj okupiĝas pri draŝado de tritiko kaj kolekto de drogherboj sur monto. Por la vilaĝo vintro estas la plej vigla sezono. Multaj junuloj edziĝas en tiu tempo, ĝenerale interne de sia nacieco. La festoj de la lisu-oj estas samaj kiel tiuj de la han-oj kaj ji-oj, ekz. la Printempa Festo kaj la Torĉa Festo." La lisu-oj kredas primitivan religion, ke ĉiuj estaĵoj havas animon. Supre maldekstre de la kuirforno en ŝia domo ni vidis malgrandan idolejon faritan el ruĝa papero, kun kokaj krestoplumoj, kio simbolas kulton de la prapatroj generacion post generacio. Ĉiufoje en la Printempa Festo oni ŝanĝas la plumojn por bonaŭguro.

La vivo de kamparanoj ne estas tiom enuiga. Sur draŝejo iuj draŝas


tritikon kaj samtempe ĝuas mildajn kantojn el magnetofono staranta sur ŝtono.


HUILI, "MEZEPOKA URBO"

En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 23 p.K.) Huili nomiĝis Huiwu. Dum jarmilo la preterpasantaj komercistoj alportis viglecon al la loko, tamen ĉio en la loko aspektas tiel simpla kaj antikva, ke ĝi sentigas fermitecon.

Antaŭe Huili estis poŝtstacio sur la antikva vojo kaj iom post iom disvolviĝis en bazaron kaj urbeton. Same kiel Dechang, ĝi havas sonoril-tamburan turon en la mezo. En sia verko "La Longa Marŝo: la nekonata historio" la usona verkisto Salisbury Harison E. priskribas: "Huili estis preskaŭ mezepoka urbo, protektata de larĝa 300-jara ĉirkaŭfosaĵo kaj du altaj kaj dikaj muroj, ekstera kaj interna ĉirkaŭoj." Laŭdire, Huili estis ununura urbo, kiun la Ruĝa Armeo intencis, sed ne sukcesis konkeri dum la Longa Marŝo. Siatempo la Ruĝa Armeo plenigis per dinamito neuzitajn ĉerkojn de bienuloj kaj fosis truojn sub la orienta kaj okcidenta pordegoj de la urbo por eksploddetrui ĝiajn turojn, tamen ne povis ĝin konkeri. Nun la ekstera muro jam estis malkonstruita kaj parto de la interna ankoraŭ restas. Inter la muroj estas loĝdomoj. La stratoj orienta, okcidenta, suda kaj norda etendiĝas de la sonoril-tambura turo ĝis la pordegoj de la urbo kaj kunligiĝas kun la antaŭurbaj vojoj. Sur ĉiuj stratoj staras butikoj unu apud alia, ke oni ne povas bone distingi la ĉefajn stratojn disde la neĉefaj.

Antaŭe en Huili estis ne nur negeco por komercistoj, sed ankaŭ preĝejoj. Iu preĝejo konstruita en 1929 restas sendifekta kaj en ĝi oni faras, kiel kutime, religian aktivadon. La 70-jara pastro Zhang Jisheng (Ĝang Ĝjiŝeng), diplomito de la Kunming-a Teologia Instituto, gvidas la Huili-an Eklezion kun du monaĥoj, ok administrantoj kaj pli ol 500 adeptoj. Tiutage ĝuste oka-





Sur strato de Dechang

zis diservo. Zhang Jisheng en religia kostumo preĝis por la adeptoj. Akompanate de orgeno la adeptoj ekkantis kantikan.

Krom ricevi monhelpon de la registaro, la eklezio ankaŭ mem kolektas monon por sin vivteni. La ĉefaj rimedoj estas funkciigi kurson de tajlorado, kulturaj kaj vendi florojn. En ĝia ĝardeno ni vidis multajn florojn, kiel kamelio kaj laŭro, kaj grapolojn da vinberoj.

ANTIKAJ PRAMEJOJ ĈE JINSHA-RIVERO

En la antikveco Jinsha-rivero nomiĝis Lishui-rivero. Kiel la supra parto de Yangzi-rivero, ĝi fon-

tas el Tanggula-montaro sur la Qinghai(Ĉinghaj)-Tibeta Altebenaĵo. Ĝi ricevis la nomon pro tio, ke ĝi abundas je ora sablo. De la enfluejo de Batang-rivero ĉe Yushu-gubernio, Qinghai-provinco, ĝis la enfluejo de Minjiang(Mingĵang)-rivero ĉe la urbo Yibin, Sichuan-provinco, kuras Jinsha-rivero kun totala longeco de 2 308 km. Sed la rekta linio inter la du enfluejoj longas nur 500 km. El tio oni vidas, kiel zigzaga estas Jinsha-rivero. Granda diferenco de akvoniveloj estas ĝia alia karakterizaĵo. La totala diferenco de ĝiaj akvoniveloj estas 3 300 m. Post preskaŭ ĉiu 1 000-metra fluo la akvonivelo malaltiĝas je pli ol unu m. La muĝado de la torento aŭdeblas eĉ plurajn km. fore.

Jinsha-rivero trafluas la sudokcidentan parton de Ĉinio. Ĝia zigzaga fluo kvazaŭ anoncas, ke la Suda Silka Vojo devas sperti la plej grandan danĝeron, kaj ĝia ondega muĝado kvazaŭ rakontas misteran historion pri sudokcidenta Ĉinio.

Kiel natura limlinio inter Sichuan kaj Yunnan, Jinsha-rivero estis natura obstaklo nepre transpasenda por la Suda Silka Vojo.

Ĉe Jinsha-rivero troviĝas multe da pramejoj. Kaj Lingguan-vojo sola transpasas jam sep grandajn pramejojn. Laŭdire, troviĝas ankaŭ 36 malgrandaj pramejoj. La plej fame konataj pramejoj ĉe la silka vojo estas Lazha (Laĝa), Longjie (Longĝje) kaj Dadu (nun la urbo Dukou).

La river-surfaco ĉe Lazha-pramejo estas vasta. La fluo estas malrapida kaj ambaŭflanke de ĝi kuŝas ebenaj plaĝoj, kio taŭgas por pramado. Hodiaŭ Lazha-pramejo pli viglas ol antaŭe. Pramŝipoj plenŝarĝitaj per veturiloj kaj pasantoj navetas inter Sichuan kaj Yunnan. Longjie-pramejo nomiĝas ankaŭ Yunchuan-pramejo. Ĝi havas historion de almenaŭ mil jaroj. Nun ĝi ankoraŭ konservas siajn antikvajn stilon kaj aspekton. Antaŭe ĝi estis prospera loko. La turistoj kaj karavanoj ŝatis gastigi tie por ĝui la riveron kaj trinki varman teon kaj post tio daŭrigis la vojaĝon. La itala vojaĝisto Marko Polo iam transveturis de tie la riveron kaj skribis en sia libro tion, kion li vidis kaj aŭdis. Ankaŭ la ĉina geografo Xu Xiake (Ŝju Ŝjake) (1586-1641) de Ming-dinastio iam venis tien. Li ege ekscitiĝis, rigardante la grandajn ideografiajn "Limo inter Sichuan kaj Yunnan" sur steleo sur la kontraŭa bordo.

Ankaŭ Dadu estas antikva pramejo. Siatempe la trupoj de Kublajo (1215-1294), fondinto de Yuan-dinastio, laŭ tri vojoj ekspediciis suden kontraŭ Dali-regno. Laŭdire, unu el ili transiris de tie la riveron. Historia libro diras, ke ĉe senhoma pramejo leviĝis ondegoj



Vilaĝo ĉe Jinsha-rivero



kaj la mongolaj armeanoj mortigis siajn militĉevalojn kaj faris boatojn el iliaj feloj por transiri la riveron kaj militiri al Yunnan. Ili, venintaj kvazaŭ el la ĉielo, surprizatakis Dali-regnon kaj okupis ĝin, tiel ke ili plenumis la taskon ĉirkaŭ la Sudan Song-dinastion kaj fine unuigis Ĉinion.

Hodiaŭ Dadu-pramejo jam fariĝis moderna ŝtal-industria urbo. Granda ponto, kiu etendiĝas tra la

urbo kaj trans la riveron, estas la unua fervoja pontego super Jinsha-rivero. Ĝi finis la historion, ke dum pli ol mil jaroj oni transiris Jinsha-riveron nur per pramo, kaj portas sur si la faman Chengdu-Kunming-an Fervojon.

La nomita fervojo etendiĝas ĝenerale laŭ Lingguan-vojo. Ĝi inaŭguriĝis la 1-an de julio 1970. Kiel nova arterio en sudokcidenta Ĉinio, ĝi komenciĝas de Chengdu,

Sichuan-provinco, en nordo kaj finiĝas per Kunming, Yunnan-provinco, en sudo, kun totala longeco de 1 085.9 km. Ĝi trapasas Sichuan-basenon, pli ol 70 ravinojn kaj 66 glitigajn lokojn, niveligis milojn da montpintoj kaj transpasas Hengduan-montaron, la Yunnan-Guizhou-an Altebenajon, 200 kotŝtonajn fluejojn, centojn da montoj, Jinsha-, Dadu- kaj Yalong-riverojn, 13-foje Niuri-riveron, 8-foje Anning-riveron kaj



En preĝejo de Huili



Lisu-aj kamparaninoj

La pramejo Lazha

49-foje Longchuan-riveron. Ĉiu ĝia 1.7-kilometra parto transiras unu ponton. La longo de la pontoj kaj tuneloj, kiujn ĝi trans- kaj trapasas, estas pli ol 400 km. kaj konsistigas 46% de ĝia totala longo.

Se vi veturas laŭ tiu fervojo, vi povas ĝui la pejzaĝojn de la antikva Lingguan-vojo, la Suda Silka Vojo. Kaj vi povas imagi, kia granda laboro estis kreo de tiu vojo en la antikveco. ■



MALKVIETA QIANQING-PALACO


Teksto de MU YI

Fotoj de YAN JIN

TRAPASINTE Qianqing-pordon, oni vidas altan imponan halon. Ĝi estas Qianqing-palaco, la unua halo en la posta parto de la Imperiestra Palaco. Post ĝi estas Jiaotai-halo kaj Kunning-palaco. Same kiel la tri haloj en la antaŭa parto de la Imperiestra Palaco, la tri postaj haloj sidas sur I-forma bazamento sur la akso de la impona konstruajaro. Tiuj 6 haloj formis la centron de la Imperiestra Palaco.

En Ming-dinastio (1368-1644) Qianqing-palaco

PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-ro 8 en la plano signas Qianqing-palacoon.

estis loĝejo de imperiestroj. Tie loĝis imperiestro Zhu Di (1403-1424 sur la trono) kaj aliaj 14 imperiestroj. Tie la imperiestroj noktis, manĝis, legis raportaĵojn kaj studis klasikaĵojn kaj historion. Iliaj edzinoj tie akompanis ilin, kaj ankaŭ la kromedzinoj, se vokite, loĝis tie por kelka tempo. Kelkiam la imperiestroj akceptis korteganojn tie.

En la antikva ĉina lingvo, la ideogramo QIAN signifas ĉielon, kaj Qing kvieton kaj pacon. La feŭdismaj imperiestroj nomis sian loĝejon QIANQING kun la sugesto, ke la lando sub ilia regado estas kvieta kaj paca. Sed fakte eĉ la imperiestroj mem ne sentis sekurecon loĝante en la palaco. En la meza kaj lasta periodoj de la dinastio okazis en Qianqing-palaco pluraj animskuaj aferoj.

En Ming-dinastio preskaŭ ĉiuj imperiestroj havis ĉe si multajn junajn servistinojn elektitajn el diversaj lokoj de la lando. Sen persona libereco tiuj servistinoj vivis mizere, loĝis en malluksaj domoj kaj devis servi dum la tuta vivo sen vizito al siaj gepatroj kaj gefratoj. Dum 1522-1566 en la palaco laboris plej multe da servistinoj, dum imperiestro Zhu Houcong severe traktis ilin. Ili estis vipitaj pro ajna kulpo, kaj pli ol 200 el ili mortis pro lia puno. Fine la servistinoj leviĝis al ribelo. Frumatene de la 21-a de oktobro 1542, kiam Zhu Houcong estis profunde dormanta, servistino Yang Jinying kaj ŝiaj dekkelkaj kamaradinoj ŝnuris la imperiestron je la gorgo. Iuj ŝtopis lian buŝon per tuko, aliaj strangolis lin kaj triaj katenis liajn gambojn. Sed pro hasteco kaj timo ili erare nodis la ŝnuron kaj ne povis streĉi la ŝnuran ringon. En tiu kriza momento iu servistino denunciis al la imperiestra edzino kaj dekoj da soldatoj venis savi lin. La servistinoj faris obstinan reziston kaj fine estis kaptitaj. Ĉiuj estis kondamnitaj al mortpuno je korpodistranĉo. La imperiestro estis elsavita, sed terurita. Li senkonsiĝis. En la pli ol 20 jaroj post la malsukcesa murdo li ne havis kuraĝon plu loĝi en Qianqing-palaco kaj sin kaŝis en la Okcidenta



La trono de imperiestro en Qianqing-palaco

Ĝardeno (la nuna Zhongnanhai) por religia memkulturo. Poste li grave malsaniĝis kaj revenis en Qianqing-palaco la 14-an de decembro 1566 kaj mortis en la sama tago.

La 18-an de marto 1644 la kamparanaj insurgen-
toj gvidataj de Li Zicheng konkeris Pekinon. La
imperiestro Zhu Youjian kunvokis la korteganojn
por interkonsiliĝi pri la kontraŭrimedoj. La kortega-
noj dronis en kompleta konsterniĝo, kaj en la palaco
regis teruro. Tiam la eksteraj urbomuroj jam estis
rompitaj de la ribelantoj kaj en la interna urbo jam
ne estis elita armeo por defendi. La imperiestron
atendis kaptiĝo. Sed iuj ruzaj korteganoj ankoraŭ
blufis, ke li ne bezonas maltrankviliĝi.

Estis malserena nokto. Frosta vento frapis la
pordojn kaj fenestrojn. Tristo kaj teruro regis en
Qianqing-palaco. La imperiestro estis informita, ke
la internaj urbomuroj jam estis rompita, kaj la
garnizono fuĝis. Li kaj unu eŭnuko eliris el la pala-
co kaj ascendis Wansui-monton (la nuna Jingshan-
monto en Jingshan-parko). Li rigardis ĉirkaŭen kaj
vidis, ke ĉie en la urbo estas fumo kaj fajro, krio
kaj plorado ĉie aŭdiĝas. Li haste reiris en la palacon,
komisiis al la duko Zhu Chunchen la prezidado de
la ŝtataj aferoj kaj subtenon al la kronprinco. Poste
li venigis la kronprincon kaj aliajn du filojn en la
palacon, ordonis ilin vesti sin kiel ordinaraĵoj popola-

Vidajo ekster la okcidenta trairejo de Qianqing-palaco



noj, kaj sendis ilin al siaj bogepatroj. La imperiestra edzino sin pendigis en Kunning-palaco. La imperiestro mem venis al la loĝejo de siaj filinoj, vundis la 15-jaran filinon Changping kaj mortigis alian filinon Zhaoren. Li vundis kaj mortigis ankaŭ siajn kromedzinojn. Li vestis sin kiel eŭnuko kaj rajdis el la palaco kune kun dekelkaj eŭnukoj. Unue li venis al la domo de la duko Zhu Zhunchen, sed la pordistoj ne enlasis lin. Li hastis al la norda urbopordo, sed la pordo estis nemalfermebla. Li revenis en la palacon. Li ordonis sonigi tamburegon kaj sonorilegon por kunvoki la korteganojn al la lasta rezisto. Sed neniu respondis. En la senelirejo li sin pendigis sub Wansui-monto. Jen pereis Ming-dinastio.

Post kiam la regantoj de Qing-dinastio prenis Pekinon kiel la ĉefurbon, la palaco Qianqing estis riparita kaj servis denove kiel loĝejo de imperiestroj. De 1644 ĝis 1723 en tiu palaco la imperiestroj Shunzhi kaj Kangxi kunvokis la korteganojn, akceptis fremdlandajn delegitojn, studis kaj legis raportojn. Sed post la forpaso de la imperiestro Kangxi (1662-1723 sur la trono), Yangxin-palaco fariĝis loĝejo de la imperiestroj, kaj la palaco Qianqing fariĝis loko por gravaj jubileoj, akcepto de mandarenoj kaj fremdlandaj delegitoj. Krome, la imperiestroj okazigis tie ceremonion kaj festenon en festotagoj.


En Qing-dinastio la palaco funkciis ankaŭ kiel funebra halo por forpasintaj imperiestroj. Kie ajn mortis imperiestro, lia kadavro devis esti reportita en Qianqing-palaccon por funebra ceremonio. Post ceremonio la ĉerko estis portempe lokita en la haloj Shouhuang aŭ Guande ĉe Wansui-monto. Fine, en la difinita tago de entombigo, la ĉerko estis portita en la maŭzoleon.

Koncerne Qianqing-palaccon estas ankoraŭ io menciinda.

Super la trono en la halo pendas ligna plato kun kvar ĉinaj ideogramoj signifantaj "honestecon kaj malkaŝemon", kiu strikte ligiĝis kun la instalado de kronprinco. Antaŭ Qing-dinastio, la heredigo de la trono estis difinita de la imperiestro, kaj la kronprinco surtroniĝis post la forpaso de la imperiestro. Kelkiam imperiestroj instalas kronprincon ĉe la morto. Sed en la konsidero, ke kronprinco kaj liaj fratoj akre batalis por la trono, imperiestro Yongzheng ŝanĝis la metodon de heredigo de la trono. Li skribis en du kopioj la nomon de la heredonto de la trono, portis unu el ili kun si kaj la alia estis konservata en skatolo metita post la ligna plato. Post la forpaso de Yongzheng la komisiitaj korteganoj kune elprenis la kopion el la skatolo kaj la alian kunportatan de la imperiestro. Post ekzameno ili oficiale proklamis la nomon de la heredanto de la trono. Sed la lastaj tri imperiestroj de la dinastio ne havis filon aŭ havis nur unu filon, do tiu metodo aboliĝis per si mem. ■



La Ter- kaj Gren-dia Altaro antaŭ Qianqing-palaco





Qianqing-palaco

Oritaj bronzajoj antaŭ Qianqing-palaco



Palacaj kaj festaj lanternoj

de LI QIANG

Palacaj lanternoj de Ĉinio, kiel speciala artoĵo fame konata tra la mondo, estas ne nur lumilo, sed ankaŭ bela ornamaĵo. En la antikveco ili pendis ĝenerale en imperiestra palaco kaj registaraj oficejoj. La palacaj lanternoj estas malsimplaj kaj diversformaj. La poŝtmarka serio prezentas palacajn lanternojn, kies framano estas farita el pterokarpa ligno kaj garnita per desegnita gazo. Ili estas delikataj kaj kolorriĉaj.

Festaj lanternoj, alinome desegnitaj lanternoj, estas popola metiartajo en nacia stilo. Kunfandiĝinte kun pentrarto, skulpturo, plektarto kaj artoj de papertondado, brodado kaj belskribado, ili simbolas bonaŭguron kaj feliĉon. Estas diversformaj festaj lanternoj, kiaj tiuj porpendaj kaj tiuj kun rivoluaj figuroj, tiuj en formo de lotusfloroj kaj tiuj kun buloj kun silka kvasto.

La ses poŝtmarkoj kun bildo de palaca lanterno (supre) estis emisiitaj la 19-an de februaro 1981, kaj la kvar kun bildo de festa lanterno (malsupre) estis emisiitaj la 28-an de februaro 1985.

